

IL POPOLO CINQUE

中國報道

2 1985





Viola magnolio

Foto de PAN JIKUN

Enhavo

Raportajoj pri Sinĝjang:

Ŝihezi — nova urbo en Gobio	2
Trezoro sub “Demona Urbo”	5
Kaŝi — antikva urbo ĉe la okcidenta landlimo	8
Familio sur stepo	11

Esperanto:

70 jaroj de Esperanto-movado en Siĉŭan-provinco	20
Kanto al lumo	23
Esp-Novajoj	25

Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ (2): Lhasa — antikva urbo sur altebenaĵo	49
---	----

Malfermita urbo: Marborda urbo Ĉingdaŭ	16
--	----

Populara scienco:

Solvinto de la “enigmo de blindiĝo de la napoleonaj soldatoj”	47
Ekologio en peklujo	48
Fazanadoj en Ĉinio	56

Literaturo: Somera travivaĵo	43
--	----

Sporto: Post reveno de Los-Anĝeleso	27
---	----

Por via sano: Masaĝo hejme praktikebla	61
--	----

Socia problemo: Privata infanvartejo	59
--	----

Nunaj ĉinoj: La unua blinda romanisto de Ĉinio	39
--	----

Vojaĝo tra Ĉinio: Ŝĵian, natura muzeo de la ĉina historio	31
---	----

Historia objekto: Grandioza scenejo en la Somera Palaco	36
---	----

Internacia ekonomio: Nova teknika revolucio kaj energia perspektivo de la mondo	66
---	----

Inter ni: El leteroj de legantoj	30
--	----

Kurantaj aferoj	63
---------------------------	----

Sur la kovrilo: Halĥazaj gejunuloj	Foto de ĈJU ŬEJBO
------------------------------------	-------------------

Sur la dorskovrilo: La subluma Luŝan-monto (Ĉinstila pentraĵo)	de LIŬ ĜUOSONG
--	----------------

Interne de la kovrilo: Viola magnolio	Foto de PAN JIKUN
---------------------------------------	-------------------

Interne de la dorskovrilo: 1. Floroj	de F. G. MARTIN (Hispanio)
--------------------------------------	----------------------------

2. Mezepoka kastelo en la urbo L’Aquila	de P. CERRETINI (Italio)
---	--------------------------

JARABONTARIFO		Francio	FF	60.00	Japanio	Yen	2 000.00	Usono	US\$	10.00	
Aŭstralio	\$A	9.00	FR Germanio	DM	18.00	Jugoslavio	Din.	300.00	Kanado	Can\$	10.00
Britio	£	5.00	Hispanio	Pts	900.00	Nederlando	Gld.	22.00			
			Italio	Lit	11 000.00	Portugalio	Esc.	700.00			
Por aliaj landoj en Eŭropo:	£	5.00	US\$	8.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:			£	2.80	US\$	4.00

Ŝihezi—nova urbo en Gobio

de CAŬ BAJLONG

La 1-a de oktobro de la pasinta jaro estis la 30-a datreveno de la fondiĝo de la Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Okaze de tio niaj raportistoj vizitis la lokon kaj verkis artikolojn.

— LA RED.

De la antikveco oni opinias, ke Ŝinĝjang, situanta en la nordokcidento de Ĉinio, estas dezerta, sekega kaj sterila loko. En Tang-dinastio en la 8-a jarcento du famaj poetoj priskribis ĝian mizerecon kaj dezertecon per jenaj versoj:

*Ankoraŭ unu glason malplenigu, mi vin petas,
Trans Janggŭan okcidente ne troviĝos jam
amikoj!*


*Ĉiuj kanaloj en la ĉirkaŭaĵo de Ŝihezi
estas borderitaj per arboj.*

*Profundas je mil futoj la sovaĝa mar' glacia,
Malĝojon spiras la vastaĵo nuba dekmil-lia.*

Tamen, dank' al la ekspluato de la laboranta popolo, aperis prospera urbo Ŝihezi en la dezerta Gobio.

La rekta ŝoseo konstruita en la senlima Gobio, ŝajnas nigra rubando sterniĝanta sur la flava tapiŝo. Kun ĝojo mi atingis Ŝihezi, veturinte pli ol 2 horojn okcidenten de Urumĉi, la ĉefurbo de la Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

Mi trovis, ke same kiel en aliaj urboj de Ĉinio, tie etendiĝas asfaltitaj vojoj, kuras aŭtoj,



staras magazenoj, butikoj, melonstandoj kaj hoteloj, kaj ke al laboro biciklas laboristoj. Ŝajnis al mi, ke mi iras en granda ĝardeno kun multaj arboj, herbejoj kaj floroj.

Estas neimageble, ke antaŭ 30 jaroj la loko abundis je fragmitoj, marĉoj, sablaj montetoj kaj tie vivis aproj.

Oni ŝuldas la konstruadon de tiu nova urbo al la diligenta laboro de la membroj de la Produkta kaj Konstrua Armeo, volontuloj por landlim-regiona konstruado kaj diversaj nacimalplimultoj.

FRUPERIODA PENADO

En la printempo de 1950, kiam jam pasis la frosta vintro kaj ekdegelis la glacio kaj neĝo, iu trupo de la Liberiga Armeo gvidata de komandoro Ŭang Ĝen venis tien. Ĝiaj gvidantoj opiniis, ke proksime de Ŝihezi situanta en la ekonomia centro de Norda Ŝinĝjang konserviĝas riĉa ŝtonoleo kaj karbo; sude estas la alta Tjanŝan-montaro, la degelinta neĝo sur la montaro povas irigacii la fekundan teron; la loko havas konvenan temperaturon kaj grandan diferencon inter la taga kaj nokta temperaturoj, tial ĝi taŭgas por produkti grenojn, kotonon, vinberojn kaj aliajn fruktojn; proksime de la loko estas vasta herbejo taŭga por paŝtado. La gvidantoj asertis, ke se oni tie konstruos novan urbon, ĝi certe feliĉigos la popolon. Tiel la urbokonstrua plano estis ellaborita.

Tiam neĝo kovris Ŝihezi kaj la temperaturo falis ĝis 30°C sub la nulo. Pro manko de

konstruaj materialoj la soldatoj dehakis arbojn en sudaj montoj kaj mem faris kalkon kaj brikojn. Pro manko de trafikilo ili utiligis neĝan vojon por treni lignon el loko je pli ol 100 kilometroj fore. Poste nemalmultaj laboristoj venis el diversaj partoj de la lando por konstruado de Ŝihezi. Hodiaŭ Ŝihezi jam fariĝis nova urbo kun areo de 460 kvadrataj kilometroj kaj pli ol 500 000 laboristoj. Tie troviĝas 35 grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj kaj en la ĉirkaŭaĵo 18 grandaj ŝtataj kultivejoj.

VERDA ĜARDENA URBO

La neĝakvo nutras la antikvan dezerton kaj la klara rivereto lirle fluas en arbaron. En la frua periodo la konstruantoj laŭplane dividis la urbon en orientan, okcidentan kaj mezan distriktojn. La orienta kaj okcidenta distriktoj estas destinitaj por industrio kaj la meza por loĝo, eduko, komerco k. a. Inter la industria distrikto kaj loĝkvartaloj etendiĝas po unu forstozono 150 metrojn larĝa. La stratoj, fabrikoj kaj loĝdomoj ĉiuj estas ĉirkaŭitaj de arboj kaj fruktoĝardenoj. La movoplena vojkruciĝo estas garnita per kvin florbetoj por faciligi veturadon, sen semaforo. Antaŭ la ofidomo en la urbocentro estas placo kun granda fontano kaj florbetoj.

Ĉe iu nova lago mi renkontis respondecon de la ĝardenistika buroo de Ŝihezi. Li konigis al mi, ke estas miraklo konstrui tiun artefaritan lagon en Gobio, kun kapacito de pli ol 20 000 kubmetroj kaj areo de ĉ. unu hektaro. Tie oni povas sketi en vintro kaj naĝi en somero. Nun en

Ŝihezi hodiaŭ



Ŝihezi oni jam plantis pli ol du milionojn da arboj, kovrantajn 29.7% de la areo, kiun oni devas verdigi, kaj en la venontaj jaroj la procenta nombro superos 50%. Tiam aperos tie ĉiamverda pejzaĝo. Mi pensas, ke hodiaŭ Ŝihezi meritas la nomon "verda juvelo" en Gobio.

VIZITO EN LA URBO

La komerca kvartalo de Ŝihezi estis movoplena. Laŭ homfluo mi eniris en foiron de agrikulturaj produktaĵoj. En altaj plastaj budoj vendiĝis hami-melonoj, blankaj sekigitaj vinberoj, sekigitaj abrikotoj, ovalaj vinberoj, tomatoj, brasikoj, florbrasikoj, terpomoj, bovaĵo, ŝafaĵo ktp.

Mi vizitis la lanteksejon Baji en la sudokcidento de la urbo, la plej grandan en Ŝinĝjang. La fabriko havas sep laborejojn kun pli ol 2 500 laboristoj, el kiuj duono estas virinoj. La fabriko ĉiujare produktas pli ol 1.5 milionojn da metroj da delikata drapo kaj pli ol 600 tunojn da fadenoj el fajna lano. Ĉar la produktaĵoj estas bonkvalitaj kaj landfamaj tekstilaĵoj, ili havas grandan debiton ne nur enlande, sed ankaŭ eksterlande.

En la sukerfabriko Baji laboristoj kontrolis kaj riparis la maŝinojn por la venonta laboroplena

Nova speco de planto kulturita de Li Ŝuŝjan, elstara agronomo de la Scienca-teknika Komitato de Ŝihezi, ricevis scienc-esploran premion de la iama Ministerio de Stataj Farmejoj kaj Ter-ekspluatado.



sezono. Tiu fabriko kun kvin laborejoj komencis produktadon en decembro de 1959 kaj estas unu el la unuaj mekanizitaj sukerfabrikoj konstruitaj de Ĉinio mem. Ĝi prenas lokajn betojn kiel krudan materialon. Ĉiutage ĝi prilaboras 1 500 tunojn da betoj kaj ĉiujare produktas 250 tunojn da sukero kaj 3 000 tunojn da alkoholo. Dank' al ĝia funkciado oni ne plu enportas sukeron el aliaj provincoj.

Mi forlasis la sukeran fabrikon kaj min direktis al la manĝaĵa fabriko, kiu havas 1 600 laboristojn. La bombonoj, kukoj kaj trinkaĵo, produktitaj de tiu fabriko, estas vendataj en la tuta Ŝinĝjang. La hami-melona suko estas specialaĵo de Ŝinĝjang kaj trovas debiton en Hongkong kaj Aŭmen (Makao). La pulvoro de buterteo tie produktita estas tre bonvena al la paŝtistoj. La lakto, sukero kaj hami-melonoj bezonataj de la fabriko ĉiuj estas loke produktitaj. Pro sufiĉeco de materialoj oni sin preparas por plivastigi la produktadon de pulvoro de buterteo kaj la hami-melona suko.

En la industria distrikto troviĝas ankaŭ tekstila kaj papera fabrikoj. Evidente, tiu nova urbo fariĝis grava tekstil-industria bazloko de la Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.


Lu Lanting, teksistino de la tekstila fabriko Baji en Ŝihezi, estas sturmano de la Nova Longa Marŝo kaj modela laboristino de la urbo.



CAŬ BAJLONG:

Trezoro sub “Demona Urbo”


EN la regiono Uerhe de la nordokcidenta parto de Ĝungar-baseno en Ŝinĝjang troviĝas “Demona Urbo”. Efektive tie ne estas urbo. Ĝi ricevis la nomon pro sia aspekto simila al antikva kastelo. Tie blovas ventego. Ĉiujare post printempo, varma aerfluo subite ekspansianta en la baseno kaj la malvarma aero venanta de nordo formas diferencon de aerpremo kaj musonon, kaj tie ofte blovas ventego de pli ol 12-a grado. Dum milionoj da jaroj ventego erozias tieajn montojn, donante al ili groteskajn formojn, kaj de malproksime ili aspektas kiel urbo. Precipe post vesperiĝo, ekblovas sablovento kovranta la ĉielon kaj teron, nebuliĝas la montetoj kaj “stratoj” tremetas monstraj ombroj. En “la urbo” ventego tor-diĝas kaj diable siblas. Tiam, irante en la loko, oni sentas sin teruritaj. Pro tio oni nomas la lokon “Demona Urbo”.



Petrol-rafinejo

ESPLORADO EN LA “DEMONA URBO”

Matenon de mezaŭtuno, akompanate de gvidisto Ĝaŭ, ni eniris en la delonge konatan “Demonan Urbon”. Trapasinte ondetan deklivon, ni vidis oran “urbon”, en la brila suno. En la “urbo” staras “katedralo”, “alta pinaklo” kaj funga “kiosko” erozie formitaj de vento. Tie troviĝas ankaŭ “bestoj”: fluganta aglo, blekanta kamelo kun levita kapo, kureganta tigro. Vere mirindaj kreaĵoj de la naturo. Subite ni trovis kvin-kolorajn ŝtonetojn diafanajn, tiam ni ĝoje deprenis ilin. S-ro Ĝaŭ diris, ke pli valora trezoro estas



*La Karamaja
Olekampo*




Ujguraj teknikistoj

tie, sur la monto. Sur la monto-talio vidiĝis kelkaj grotoj, kie amasiĝis jutsakoj kun nigraj briletantaj buloj. Ĝaŭ klarigis, ke tio estas rara bituma mino en la mondo. En la montoj troviĝas sep senkovraj bitumaj vejnoj kun longo inter 400 kaj 1 000 metroj surtere. Tia natura bitumo estas pura kaj uzebla sen prilaborado. Ĝi estas materialo por produkti altklasan lakon kaj elektran izolilon. Natura bitumo indikas ekziston de subtera petrolo. Antaŭ ĉ. cent milionoj da jaroj tie estis marĉejo kun milda klimato. Tie vivis dinosaŭroj, fiŝoj kaj efemeroj. Poste terkrusto ŝanĝiĝis, tero leviĝis, la akvejoj sekiĝis kaj formiĝis dezerta baseno. La enterigitaj vivaĵoj fariĝis petrolo kaj fosilioj. En ĉi tiu regiono malkaŝiĝis ne nur petrolo, sed ankaŭ dinosaŭra fosilio. La fosilia "Ĝungar-pterodaktilo" nun konserviĝas en muzeo.

EKSPLUATADO DE LA PETROLA REGIONO

Nemalproksime de la "Demonia Urbo", vicoj da ŝaktoskafaldoj kaj oleocisternoj aperis antaŭniaj okuloj. Ni jam venas al la fama nordokcidenta petrolo urbo Karamaj. Karamaj en la ujgura lingvo signifas "lokon de nigra oleo".



Parto de Karamaj

Antaŭ 1949, la lokon oni ne povis trovi sur la mapo. En la 40-aj jaroj tie estis neniu loĝanto. Iuj paŝtistoj preterpasantaj hazarde trovis en malalta loko nigran fluidaĵon, kiu povas esti uzata kiel brulaĵo kaj lubrikaĵo. Ili do ricevis grenon kontraŭ fluidaĵo. Poste oni informiĝis, ke tie estas la loko Hejjoŭŝan kun fluanta petrolo dekojn da k.m., kio estis priskribita en historia materialo antaŭ pli ol mil jaroj. En la posta 19-a jarcento la registaro de Ĉing-dinastio faris esploradon al la loko kaj raportis, ke tie troviĝas naŭ truoj el kiuj fluas ĉiutage ĉ. 200 kg. da nafto. En la 53 jaroj de 1897 ĝis 1949, la loko produktis nur iom pli ol 12 000 tunojn da nafto.

Komence de 1951, la ŝtato sinsekve sendis petrolajn geologiajn taĉmentojn al Ĝungar-baseno kaj Hejjoŭŝan. En junio de 1955 oni boris la unuan puton kaj konstatis, ke la loko havas avantaĝan geologian strukturon por estiĝo de petrolo; la petolvejno estas malprofunde sub la tero, la premo de petrolo estas alta; la petrolo estas densa kaj ne koaguliĝas eĉ en temperaturo de -60°C kaj taŭgas por rafini petrolaĵojn por malvarma regiono. Tial la ŝtato decidis grandskale ekspluati la olekampon Karamaj. En 1958 ĝi oficiale produktis nafton. Ĝis la fino de 1959 ĝia produkto-kvanto okupis kvaronon de tiu de la lando.

En disvolviĝo de produktado fondiĝis urbo Karamaj en 1958. Troviĝante en la urbo, oni tamen ne opinias ĝin industria kaj mineja urbo: anstataŭ multajn fumtubojn, ni vidis nur arbojn ambaŭflanke de la stratoj, kaj ne estis oleaodoro. Magazeno, kinejo, banko kaj loĝdomoj staras unu



apud alia. Plejparto de la loĝantoj estas petrolaj laboristoj kaj iliaj familianoj. La nova foiro de agrikulturaj produktaĵoj okupas areon de pli ol 1 400 kvadrataj metroj kaj plenas de fruktoj kaj legomoj. En la elĉerpita regiono estas konstruata parko Hejjoŭŝan, kun lageto, kiosko, amuzejo, restoracio k.a.


PERSPEKTIVO DE LA OLEKAMPO

Ni vizitis laborantojn de petrola scienc-teknika departemento kun la peto, ke ili konigu la perspektivon de Karamaj-olekampo. Ili diris, ke nun Karamaj jam estas kombinita entrepreno kun borado, petrolkolektado, rafinado kaj transportado. Ĝia nuna petrola produktokvanto egalas al kvaroblo de tiu de la komenca periodo de la 60-aj jaroj. La nafto estas portita per oleduktoj al la proksima Duŝanzi-petrolrafinajo, al la Urumĉia Petrolkemia Fabriko centojn da kilometroj for de la loko aŭ trajne transportata al landinternaj lokoj por prilaboro. En la lastaj jaroj, la olekampo ekipis sin per novaj instalaĵoj kaj altigis la produktopovon, kaj la produktokvanto de petrolo superis 4 milionojn da tunoj. En nova olea regiono, en 1983, oni boris oleputon ĉiutage produktantan pli ol cent tunojn da petrolo. En la malnova olea regiono oni ankaŭ boris oleputojn produktantajn ĉiutage 50 — 100 tunojn. Tio pruvis, ke sub la malnova oletavolo ankoraŭ troviĝas nova petrolvejno egale dika en la nuna Karamaj.


Pere de la prospektorado en la lastaj du jaroj en Ĝunggar-baseno, oni ekhavis novan konon pri la Karamaja faŭlta zono ĉe la nordokcidenta

rando de la baseno kaj konstatis, ke la faŭlta zono estas granda, ĝiaj petrolvejnoj dikaj. Nun oni jam trovis konservokvanton de kelkcent milionoj da tunoj. Tiuj valoraj riĉfontoj solide fundamentis la disvolviĝon de la Ŝinĝjang-a petrol-industrio. Baldaŭ aperos pli granda Karamaj-olekampo.

Laboristoj en la olekampo



Geologia esplorado



Kaŝi – antikva urbo ĉe la okcidenta landlimo

POST kvar horoj da flugado, mi venis de Urumĉi al Kaŝi en la suda parto de Ŝinĝjang. Tute pravas la diro, ke oni ne povas percepti la vastecon de Ĉinio sen viziti Ŝinĝjang kaj la vastecon de Ŝinĝjang sen viziti ĝian sudan parton.

Kaŝi, la plej okcidenta antikva urbo de Ĉinio, situas ĉe la piedo de Congling-monto, estas la gorĝo de Tarim-baseno kaj okcidente, trans la monda firsto, estas la Mez-Azia Ebenaĵo. De la antikveco ĝi estas grava pasejo al meza Azio. Tiel frue kiel en la dua jarcento a. K. ĝi jam estis fama urbo kun interkruciĝantaj vojoj kaj multe vizitata de komercistoj sur la Silka Vojo. Tiam la urbo portis la nomon “Kaŝgar”, kiu signifis “verda domo” en tuĝjue-lingvo, ĉar la tiamaj urbo-muroj estis masonitaj el verdaj brikoj.

En la urbo sterniĝas ebenaj stratoj ombritaj ambaŭflanke de poploj. La merkato estas vigla. Sur la stratoj, krom aŭtoj kaj bicikloj, ruliĝas ankaŭ azenĉaroj, sur kiuj sidas ujuguraj maljunuloj kun blanka barbo kaj en bunta ĉapo kaj ujuguraj knabinoj en freŝ-kolora robo. Inter la pasantoj troviĝas iuj virinoj vualitaj. La okcident-tipaj etaĝdomoj kaj moskeoj kun verda kupolo starantaj apud la stratoj pensigas pri mez-aziaj urboj. Pli ol 95% de la loĝantoj de Kaŝi estas ujuguroj. Jen oni diras, ke oni nepre devas viziti Kaŝi vojaĝante en Ŝinĝjang.


DELIKATAJ NACIECAJ METIARTAĴOJ

Ujuguroj senescepte ŝatas porti buntan ĉapon. Tia ĉapo estas delikate brodita, en aparte nacieca stilo. Lertaj ujuguraj virinoj povas brodi pli ol ducent desegnojn sur ŝtofo de malpli ol unu kvadrata futo. La plej ofta desegno estas rozo. Alia speco de ĉapo estas farita el verda brokato per oraj fadenoj. En la Metiartaĵa Fabriko de Kaŝi mi propraokule vidis, kiel lerte ujuguraj laboristinoj faras ĉapon. Estrino de la fabriko Ŝebijan konigis,

ke la fabriko havas pli ol cent kvardek oficistojn kaj laboristojn kaj produktas kvardek naŭ specojn da ĉapoj kaj krome ankaŭ faras por la naciminoritatoj pli ol tridek specojn da muzik-instrumentoj kiaj ĵivapo kaj dutaro. La muzikiloj estas kolore lakitaj kaj inkrustitaj per perlamotoj, bov-ostpecoj aŭ jadpecoj. Ĉiu el ili estas kaj muzikilo kaj artaĵo. Iu maljuna laboristo, preninte ĵivapon, ekludis ĉarman melodion. La fabriko produktas ankaŭ tapetojn, brodaĵon, tranĉiletojn, porcelanajn botelojn kaj pelvojn, kuprajn kruĉojn kaj aliajn. Neniu avaras laŭdojn rigardante tiujn delikataĵojn. Ŝebijan diris, ke la ujuguraj virinoj ŝatas porti ornamaĵojn. Preskaŭ ĉiuj virinoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, portas orel- kaj fingroringojn. La diversaj oraj ornamaĵoj produktitaj de la fabriko, kvankam kompare multekostaj, havas grandan debiton.

ETIGAR-PLACO

Ĉiuj, kiuj vizitas Kaŝi, volas viziti la nomitan placon en la urbo-centro por rigardi la antikvan Etigar-moskeon. Ujuguroj plejparte kredas je islamo, tial en Ŝinĝjang estas multaj moskeoj, inter-



Etigar-moskeo

alie Etigar-moskeo estas la plej granda kaj povas enteni ĉ. sep mil islamanojn por preĝado.

Etigar-moskeo sidas en la nordokcidenta angulo de la placo. Ambaŭflanke de ĝia alta rektangula pordego staras po unu turo alta je pli ol dek metroj. Malaltaj muroj interligas la pordegon kaj la turojn. Sur ĝiaj kremkoloraj muroj vidiĝas blankaj brik-fendoj kaj desegnaĵoj. Tio impresas per digneco, soleneco kaj majesteco. La blanka volbo super la pordego kaj la du lunarkaj feraj pinakloj de la turoj formas harmonian tuton. La moskeo okupas areon de ĉirkaŭ unu hektaro kaj havas plank-areon de pli ol dek ses mil kvadrataj metroj.

Ĉirkaŭ la placo estas homplena bazar. La budoj vendas ĉapojn, tranĉiletojn, vestojn, ledbotojn kaj aliajn ĉiutagajn bezonaĵojn, kaj ankaŭ mangaĵojn, kiaj rostitaj ŝafaĵoj sur stangetoj, bakita ujugura pano, hami-melono kaj akvo-melono.

Tra la dekstra galerio mi eniris en la korton de la moskeo, trapasis malaltan muron el balustroj, ascendis terason altan je unu metro kaj venis en la preĝan halon. Ekster la halo dekkelkaj ujuguraj maljunuloj pie preĝis surgenue.

La preĝa halo longas cent sesdek metrojn kaj profundas dek ses metrojn. Cent kvardek verdaj lignaj kolonoj kun skulptaĵoj subtenas la blankan plafonon surhavantajn diversajn pentritajn florojn. En la centra muro de la halo estas pinta niĉo kun koloraj desegnaĵoj.

En la preĝa halo mi intervidiĝis kun tri multe respektataj maljunaj imamoj. Inter ili Kasim Hacijaci, en 1979, pilgrimis al Mekko kaj vizitis Kuvajton, la Nordan Jemenon kaj Omanon. Li

diris, ke Etigar-moskeo estas pli granda ol tiu de Omano. Ĝi akceptas kelkmil homojn en ordinaraĵoj kaj pli ol kvindek mil okaze de la islamaj festoj.


SANKTA MONTO

Mi vizitis antikvan malgrandan vilaĝon Opal pli ol 50 kilometrojn for de Kaŝi. Sude kaj okcidente de la vilaĝo majeste staras neĝ-kovritaj montoj kiel kurtenoj, norde kaj nordokcidente etendiĝas Gobio. En la vilaĝo verdas arboj, interplektiĝas kampoj, pepadas birdoj, ĉie regas viveco. Ĉe la okcidenta ekstremo de la vilaĝo troviĝas monteto, kie rojas fontoj kaj kreskas ĉielskrapantaj antikvaj arboj. Vere pentrinda pejzaĝo. Ujuguroj nomas ĝin "Sankta Monto", ĉar sur ĝi estas enterigita la fama ujugura erudito Muhamet Kaskari, la aŭtoro de "Plena Vortaro en Tuĝjue-lingvo". Opal estas lia naskiĝ-loko.

La "Plena Vortaro en Tuĝjue-lingvo" estas la unika vortaro de la antikva lingvo. Ĝi entenas pli ol 7 500 vortojn, uzatajn siatempe de diversnaciecaj popolanoj de tiu lingva familio. Ĝi estas skribita en la araba lingvo. La vortaro multe priskribas la sociajn morojn kaj kutimojn de Ŝinĝjang kaj diversaj lokoj de meza Azio, enhavas kelkcent tiam cirkulantajn popolkantojn kaj poemojn kaj konigas pri la devenoj de multaj loknomoj kaj nomoj de naciecoj kaj triboj kaj animaloj, vegetaloj, riveroj, montoj, religioj, teritorioj ktp. La vortaro konigas ĉion, kio rilatis siatempe kun tuĝjue-lingvo. Tre klaraj estas la devenfontoj kaj klarigoj de la vortoj.

Muhamet estis fama erudito de Hala-regno de la 11-a jarcento p. K. Li naskiĝis en nobela

Kampanoj de Kaŝi veturantaj al bazar





Uguraj virinoj sur strato de Kaŝi



Bazaro

familio kaj de la infanaĝo ricevis bonan edukadon de siaj gepatroj. Antaŭ ol kompili la vortaron, li faris esploradon pri la lingvo en Kaŝi, vizitis ĉiujn stepojn kaj vilaĝojn loĝatajn de tuĝjue-anoj, kaj ankaŭ vojaĝis al diversaj lokoj de meza Azio kaj atingis Bagdadon, la ĉefurbon de la islama

mondo de tiu tempo. Tie li konatiĝis kun nemalmultaj eruditoj kaj legis multajn librojn. Li komencis kompili la vortaron en 1072 kaj finis ĝin en 1074. Post la fino de la kompilado la manuskripto de la vortaro cirkuladis, sed poste perdiĝis sen postsigno dum kelkcent jaroj. Fine en 1914 ĝi mirakle reaparis.

La retrovo de tiu granda verko sensaciis en la akademiaj rondoj de Turkio kaj aliaj landoj de la mondo. Ĉar, antaŭe oni tre malmulte sciis pri la lingvo, socia moralo, literaturo, arto, politikaj trajtoj, viv-regiono, religio kaj kutimoj de tuĝjue-oj. Nun, tiu granda vortaro jam estas tradukita en la germanan, rusan kaj aliajn lingvojn. Ĉinio eldonis ĝian unuan volumon en la ujugura lingvo, kaj la aliaj du volumoj estas en tradukado.

LEGENDO PRI LA MAŬZOLEO DE IMPERiestra KROMEDZINO ŜJANGFEJ

La maŭzoleo distancas de Kaŝi dek kilometrojn kaj estas nepre vizitata vidindaĵo. Ĝin ĉirkaŭas ĉiel-skrapaj arboj kaj apude lirlas klara akvo. Malofta kvieta medio.

Kiam la pordisto malŝlosis la pordon kaj kondukis min en la korton, antaŭ miaj okuloj prezentigis bela, grandioza kaj impona konstruaĵo de mez-azia stilo. La tuta konstruaĵo estas kvadrata. La muroj estas masonitaj el verdaj kaj purpuraj brikoj. Altaj rondaj kolonoj ĉe kvar anguloj ĉirkaŭe subtenas la kupolon en la centro. Sur la turo brilas orita lunarko.

Oni diris, ke dum la regado de imperiestro Ĉjanlong (1711-1799 p. K.) de Ĉing-dinastio, la 22-jara ujugura knabino Memur Ezim, pro merito de sia familio al la ŝtato, estis envenigita en la imperiestran palacon kaj fariĝis kromedzino de la imperiestro. Post ŝia morto, laŭ la ordono de la imperiestro, oni transportis ŝian korpon en la hejm-lokon kaj konstruis por ŝi tiun maŭzoleon. Sed poste, laŭ la historiaj registroj oni konstatis, ke Ŝjangfej estis la ujugura edzino Ĵong de imperiestro Ĉjanlong. Ŝi mortis en 1788 en la aĝo de 55 jaroj kaj estis entombigita en la Orienta Maŭzolearo (unu el la maŭzoleoj de Ĉing-dinastio en la nuna Zunhŭa-gubernio de Hebej-provinco). La tiel nomata "Maŭzoleo de Ŝjangfej" fakte havas 72 grandajn kaj malgrandajn tombojn de kvin generacioj de ŝiaj prapatroj. Kvankam Ŝjangfej ne estis entombigita tie, tamen tio ne malpliigas la valoron de la maŭzoleo.

Familio sur stepo


AŬTOMOBILO kuris sur ŝoseo de Pamir-Altebenaĵo. Mi kaj mia interpretisto kaj gvidisto, nove konata amiko Suliĝi interparolis, ĝuante la belan pejzaĝon ekster la aŭtomobilo.

Mi veturis por viziti ĥalĥazojn. Tiu ĉi antikva nomada nacieco de Ĉinio nun havas cent dek kvar mil membrojn kaj plejparto el ili loĝas en la Kizilsu-a Ĥalĥaza Aŭtonoma Subregiono de la Sinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Nun ili vivas ĉiam pli feliĉe kaj stabile, tamen konservas ankoraŭ multajn kutimojn de nomada vivo.

La aŭtomobilo forlasis la ebenan ŝoseon kaj malrapide ekiris antaŭen laŭ la bordo de la zigzaga Kizilsu-rivero. "Kizilsu" en la ĥalĥaza lingvo signifas ruĝ-akvan riveron. La torenta rivero, kiel larĝa arĝenta rubando, dividis la verdan naturan paŝtejon en plurajn herbejojn, inkrustitajn inter montoj. Kizilsu-rivero nutras la ambaŭbordajn paŝtejojn kaj la diligentajn popolanojn generacion post generacio. Post pli-ol-kvinhora ve-

turado, antaŭ ni aperis disaj jurtoj kaj brutogregoj. La paŝtistoj, kiuj falĉis per longtenila falĉilo, salutis nin, svingante sian manon. Suliĝi diris, ke tie estas somera paŝtejo de ĥalĥazoj.

Ni haltis antaŭ iu nova jurto. La bruo de aŭtomobilo venigis divers-aĝajn loĝantojn. Oni svarme eliris por bonvenigi nekonatajn gastojn. Ĥalĥazoj estas entuziasmaj kaj gastamaj. La gastoj, ĉu konataj, ĉu nekonataj, senescepte estas varme regalitaj. Post manpremo kaj saluto, la mastro prenis sakon faritan el tuta bovida ledo, elverŝis neĝblankan ĉeval-lakton kaj respekte donis al la gastoj. Trinki ĉeval-lakton estis la unua fojo por mi. Ĝi unue impresis min per sengusteco, sed post kiam mi fortrinkis bovlon da lakto mi sentis bierecan aromon. La mastro kondukis nin en la jurton kaj mi vidis, ke surtere sterniĝas memfarita brodita tapiŝo, meze estas forno, maldekstre selo kaj diversaj objektoj, dekstre kuiriloj kaj manĝaĵoj. Ĉio estas pura kaj bonorda. Sur



Paŝtejo en mateno

la ronda ĉirkaŭmuro de la jurto pendas luksaj drapiraĵoj kaj teksaĵoj kun vivecaj desegnaĵoj de birdoj, bestoj kaj geometriaj figuroj. La jurto el dika felto estas taŭga por rezisti kontraŭ vento kaj frosto, sed ne malhelpi la sunradio-penetradon kaj aerumadon.

Laŭ la loka kutimo, la mastro petis nin sidiĝi fronte kaj ni komencis senĝene interparoli. Tiam la mastrino elportis gruntbodyolaktan teon, fromaĝon, krustan kukon kaj aliajn manĝaĵojn. Mia gvidisto Suliĝi diris al la mastro pri nia vizita intenco. Aŭdinte tion, la mastro ekĝojis kaj insistis petis nin tranokti ĉe ili, ĉar li volis buĉi ŝafon kaj prezenti la kuiritan ŝaf-kapon al la gastoj el malproksimo kaj poste prepari por ni dolĉan lakto-rizon. Ĥazjoŭz, la mastro, estas mezaĝulo modesta. Li kun blanka felt-ĉapeto kaj herbo-verda uniformo diris al ni, ke laŭ la kutimo, la ĥalĥazaj viroj vestas sin per robo kaj virinoj mantel-jupo. Knabinoj portas galonan velur-ĉapelon. Tamen nun ili portas ruĝan kaptukon. Virinoj ŝatas ruĝon kaj rigardas ĝin kiel simbolon de feliĉo.

En la vivo kaj produktado, ĥalĥazoj havas siajn proprajn kutimojn kaj morojn. Ekzemple, tre interesa estas la novjara festado. La mastro konigis, ke laŭ la antikva kalendaro de ĥalĥazoj, la 11-a de ĉiu januaro estas Novjara Tago. Tiu-tage ĉiu familio buĉas ŝafon kaj kuiras kaĉon per hordeo, tritiko kaj aliaj 5 grenspecoj, kio simbolas riĉrikolton kaj abundan manĝon por la venonta jaro. En vesper-krepusko de la novjara tago, ĉiu familio bruligas fajron antaŭ sia pordo, kiun devas trasalti revenintaj paŝtistoj kaj brutoj por forigi katastrofon kaj malfeliĉon kaj beni la homojn kaj brutojn kaj ilian prosperon.

Kiam ni interparolis kun la mastro, la jurto iom post iom pleniĝis de homoj, venintaj de apudaj jurtoj. Nin salutante, viroj faris manpremon kaj virinoj riverencon kun kruciĝintaj manoj antaŭ la brusto. Ĥazjoŭz flustris al mi, ke ĉe la pordo staras novedzino nur de semajno. La bela novedzino estas sincera kaj hontema. Kiam ŝi trovis, ke mi intencis foti ŝin, ŝi tuj sin kaŝis post la homojn. Mi petis Suliĝi transdoni al ŝi mian benon kaj ŝi ĝentile esprimis sian dankon. Kiam mi petis ŝin paroli pri la gaja nupta ceremonio, ŝi iom embarasite forkuris eksteren. Ĥazjoŭz diris al mi, ke julio, aŭgusto kaj septembro estas ora sezono sur la stepo. Tiam abundas herboj kaj aromas melonoj kaj fruktoj, kaj gejunuloj vigle serĉas por si amatojn. Okaze de la gefianĉiĝo la

junulo ĉevale portas donacaĵon al la hejmo de la fianĉino, kiam la gepatroj de la fianĉino varme akceptas la venintojn kaj surŝutas sur ilin blankan pulvoron, dezirante feliĉon kaj favoron al la gefianĉoj. La geedziĝa ceremonio okazas en la hejmo de la novedzino. Por venigi ŝin, la novedzo devas buĉi du ŝafojn, kuiru unu el ili kaj rosti la alian. Kun la du ŝafoj kaj dek kelkaj vivaj brutidoj, la novedzo iras al la hejmo de sia edzino. Antaŭ la ceremonio, la parencoj kaj amikoj de la novedzino kunligas la nov-geedzojn ekstere de la jurto. Kaj nur post prezento de donacaĵoj kaj ripetadaj petoj far la gepatroj de la novedzo, ili rajtas liberigi la nov-geedzojn. La ceremonio okazas islame. La nov-geedzoj sidas unu kontraŭ la alia, imamo recitas koranon, elmetas demandojn, duonigas krustan kukon kaj post tempo en salakvon donas al la geedza paro. Tio signifas, ke post la geedziĝo ili kune dividos feliĉon kaj malfeliĉon kaj fidele vivos ĝis la tombo. En la sama tago, la parencoj kaj amikoj de nov-geedzoj prezentas gajajn dancojn kaj kantojn kaj okazigas konkursojn de surĉevala ŝafkupto, ĉevalkonkurso kaj aliaj.

Ni restis semajnon en landlima paŝtejo, observis la kutimojn kaj morojn de la ĥalĥazoj kaj gustumis step-aromantajn bongustaĵojn. Ĝuste kiam ni revenis, la paŝtistoj pretis translokiĝi al alia paŝtejo.

Surĉevala lukto, ŝatata sporto de ĥalĥazaj paŝtistoj






Ĥalhazaj paŝtistoj

Ĥalhazoj

Fotoj de ĈJU ŬEJBO


Brodado






Gastoj en jurto





Reveno de paŝtado



Ornamaĵoj de jurto

Ĉeval-konkurso





MALFERMITAJ URBOJ

Marborda Urbo Ĉingdaŭ

de LI ĈJANG

Fotoj de HAJ FENG kaj SUN LIĜI



1
2
3

Ĉe marbordo de Ĉingdaŭ

Marbanejo

Haveno



SEPTEMBRE de 1984 du kompanioj de Ĉingdaŭ subskribis en Pekino traktaton kun du kompanioj de Finnlando pri kuna fondo de fabriko en Ĉingdaŭ por produkti krucovlakojn. Ĝi estos la unua fabriko funkciigita de la du landoj per kuna kapitalo kaj ankaŭ estas la unua tiuspeca industria objekto interkonsentita post kiam Ĉingdaŭ plie malfermiĝis al la tuta mondo en majo de la pasinta jaro.

Ĉingdaŭ estas havenurbo, kie oni ĉefe okupas sin pri tekstilaj industrioj, ekstera komerco, oceanologia esplorado kaj turismo. Kiel malfermita urbo ĝi havas multajn avantaĝojn kaj belan perspektivon en disvolvo.

La urbo situas en la suda parto de orienta Ŝandong-duoninsulo. Ĝi, konsistanta el ses distriktoj

kaj ses gubernioj, havas totalan areon de 10 654 kvadrataj kilometroj kaj 6.2 milionojn da loĝantoj. Ĉirkaŭite de maro en tri flankoj la urbo havas belan pejzaĝon kun ondeta tero kaj verdaj arboj, freŝan aeron kaj agrablan klimaton dum la tuta jaro.

En Ĉingdaŭ facilas la trafiko. La haveno kun akvo profunda, neglaciiganta, havas naŭ kajojn kaj 49 ŝipankrejojn, el kiuj 15 povas ankri pli-ol-dekmil-tonelan ŝipon. Ĝi ĉiujare povas enkaŝi pli ol 22 milionojn da tunoj da varoj kaj okupas la kvaran lokon laŭ la transporta kvanto en Ĉinio. Ĝi estas unu el la kvin grandaj havenoj por ekstera komerco en Ĉinio. Ĝiaj oceanaj ŝipoj veturas al multaj landoj kaj regionoj de la kvin kontinentoj. Fervojoj kondukas rekte de la

urbo al Pekino, Senĵang, Ŝanhajo, Langou, Ŝjining, Ĝjnan kaj aliaj grandaj kaj mezgrandaj urboj; aeraj linioj interligas la urbon kun Pekino, Ŝanhajo kaj Daljan. Ĉi-jare la flughaveno de Ĉingdaŭ malfermos novajn aerajn liniojn enlandajn kaj internaciajn. Videble ĝi fariĝos trafika centro de Ŝandong-provinco kaj la plua malfermiĝo de la urbo certe havos gravan influon al la ekonomia disvolvo de la provinco.

Ĉingdaŭ estas vigla industria urbo, kies tekstilado havas longan historion kaj okupas gravan lokon en Ĉinio. Ĝiaj naŭ grandaj ŝpinteksejoj kaj multaj kompletigaj fabrikoj povas fari ŝpinadon, teksadon, tinkturadon, trikadon de kotono, lano, juto, silko kaj kemiaj fibroj, pro tio la urbo fari-

Parto de Ĉingdaŭ



ĝis bazo de produktado kaj eksportado de tekstilaĵoj. Ĝiaj multaj teksaĵoj estis elektitaj kiel ĉinaj bonkvalitaj produktaĵoj. Ekzemple la sportkostumoj el poliestera kaj kotona miksaĵo kun marko "Blua Ĉielo" produktita de la Tria Trikota Fabriko de Ĉingdaŭ estis honoritaj per la ŝtata ora medalo pro siaj beleco de koloroj, multeco de specoj, fortikeco kaj komforteco. Antaŭ kelkaj jaroj la fabriko importis avangardajn ekipaĵojn, kiuj levis la teknologian nivelon, plibonigis la kvaliton de produktaĵoj kaj grandigis ekonomian profiton. Nun la fabriko planas enkonduki alian aron da avangardaj maŝinoj por multe levi la produktokvanton konforme al la postuloj de la en- kaj eksterlandaj merkatoj.

Ĉingdaŭ okupas la trian lokon en Ĉinio rilate al la kaŭĉuka industrio. Ĝi ankaŭ havas certgradan bazon en la nove leviganta elektronika industrio. Ĝiaj biero kaj minerala akvo kun marko


"Laŭŝan" jam antaŭlonge famiĝis tra la mondo. Ĉingdaŭ havas riĉan fonton de agrokulturaj, lokaj, akvaj kaj aliaj produktaĵoj, el kiuj centoj da specoj eksportiĝas eksterlanden. Nun entreprenoj de tiuj fakoj planas enkonduki multajn avangardajn teknikojn kaj produktajn ekipaĵojn. Por tio la urbo sendis al Hongkong kaj Aŭmen esploran delegacion kun vicurbestro kiel la ĉefo. Ĝi kontaktis tie pli ol 80 fabrikojn kaj entreprenojn kaj subskribis 27 protokolojn kaj traktatojn pri kuna entreprenado, kunlaboro, muntado per liveritaj partoj, eksterkomerca kompenso kaj enkonduko de teknikoj kaj ekipaĵoj.

En la lastaj monatoj pasintjare komercistoj el Usono, Italio, FR Germanio, Kanado, Aŭstralio, Finnlando, Svisio, Svedio kaj Japanio venis al Ĉingdaŭ kaj faris pli ol 100 interkonsentojn kun la urbo pri ĝia utiligo de ekstera kapitalo, enkonduko de teknikoj kaj ekipaĵoj. Laŭ plano antaŭ la

jaro 1990 440 gravaj teknikaj renovigoj estos plenumitaj. Ĉingdaŭ ankaŭ pretas kunlabori kun fremdaj komercistoj pri funkciigo de entreprenoj proponitaj de ili kaj taŭgaj por la urbo.

Hŭangdaŭ (Flava Insulo) je 2.26 mejloj for de la urbo estas difinita kiel distrikto de ekspluatado de ekonomio kaj teknikoj de Ĉingdaŭ. Ĝi interligas sin kun la kontinento per digo kaj havas tre facilan trafikon maran kaj surteran. Antaŭ kelkaj jaroj konstruiĝis tie elektrejo, kajo kaj olehaveno kun jara transporta kvanto de dek milionoj da tunoj. Tiuj konstruoj metis bonan bazon por konstruo de la distrikto. Laŭ la unuapaŝa plano antaŭ la fino de la nuna jarcento Hŭangdaŭ fariĝos prilaborindustria distrikto kun areo de 15 kvadrataj kilometroj, cent mil loĝantoj kaj 300-400 entreprenoj inkluzive de tiuj teknike avangardaj entreprenoj funkciigitaj kune per ĉina kaj fremda kapitaloj aŭ de fremdaj komercistoj mem. La konstruado


La ole-haveno Hŭangdaŭ





Biero de Ĉingdaŭ

Laborejo de la Kvina Tekstila Fabriko de Ĉingdaŭ



de la distrikto plenumiĝos en pluraj periodoj. Antaŭ 1986 oni ekspluatos areon de du kvadrataj kilometroj kaj konstruos aron da industriaj entreprenoj kaj koncernaj instalaĵoj por administrado, vivo, komerco kaj servado.


Ĉingdaŭ ĉiujare allogas al si milionojn da en- kaj eksterlandaj turistoj per siaj bela pejzaĝo kaj vidindaj lokoj. Ĝi havas bonajn kondiĉojn kaj grandegajn latentajn fortojn por disvolvi turisman aferon. Konforme al la plua malfermiĝo de la urbo oni, krom reformi la ekzistantajn turismajn instalaĵojn, plibonigi la pitoreskejon de Laŭŝan kaj multigi turismajn produktaĵojn, konstruos aliajn du turismajn lokojn, t. e. Ŝjueĝja-insulo kaj Ŝilaŭĝen (Stona Maljunulo).

Ŝjueĝja-insulo estas tri kilometrojn for de Hŭangdaŭ. Tie oni konstruos hotelojn, vilaojn, marbanejon, fiŝhokejon, hipodromon, golfejon kaj aliajn amuzejojn, kiuj servos al feriantaj ĉinoj kaj fremdlandaj laborantoj kaj turistoj. La turisma loko Ŝilaŭĝen sin


trovas inter la urbo kaj Laŭŝan-pitoreskejo. Ĝi rigardas al maro kun la dorso al monto. La rifo "Ŝtona Maljunulo" kun mita nuanco staras sur maro nemalproksime de la bordo. La urbo planas uzi fremdan kapitalon por konstrui tie altnivelan interna-

ciajn klubejon, halon por internaciaj kunvenoj, vendejon por fremdlanduloj, hotelojn, vilaojn kaj diversajn amuzejojn, tiel ke la loko fariĝos moderna turisma centro. Ĉi-jare oni plenumos iujn instalaĵojn kaj malfermos ilin al turistoj.

La produkta linio importita de la Ĉingdaŭ-a Bier-farejo el Japanio



70 jaroj de Esperanto-movado en Siĉŭan-provinco



Esperantistoj de Siĉŭan de la tridekaj jaroj

SICŬAN-PROVINCO, honora kiel "Lando de Abundeco", sin etendas inter montoj de sudokcidenta Ĉinio. Ĝi havas longan historion kaj tradician kulturon kaj estas ankaŭ unu el la ĉinaj landinternaj provincoj, kien Esperanto enkondukiĝis frue.

En 1916 la Ĉengdu-a Esperanta Klubo fondiĝis en sia ĉefurbo Ĉengdu. En la 20-aj jaroj Ba Ĝin (Bakin), fama verkisto kaj membro de la Honora Patrona Komitato de la Universala Esperanto-Asocio, Lu Ĝjanbo, profesoro de la historia fakultato de Siĉŭan-universitato kaj fama esperantisto, k. a. jam enviciĝis

inter la esperantistoj de Siĉŭan-provinco. En 1923 Ba Ĝin veturis al Ŝanhajo kaj kune kun la eminentaj esperantistoj Hu Juĝi (Hujucz), Ŝeng Ĝuoĉeng, Ĉen Ĝaŭjing, Sofio kaj Ŭang Lujan organizis tie la Ŝanhajan Esperantan Asocion kaj poste iniciatis la gazeton «Verda Lumo». Post nelonge ankaŭ Lu Ĝjanbo veturis al Ŝanhajo kaj eklernis en unu el ĝiaj altlernejoj. Li aliĝis al la Ŝanhaja Esperanta Asocio kaj komencis traduki Esperantajn literaturaĵojn de Sovetunio kaj orient-eŭropaj landoj por konigi ilin al Ĉinio kaj landoj de Sudorienta Azio. Komence de 1925 U Ŝjanjoŭ fondis

en Ĉengdu la Ĉengdu-an Esperantan Studrondon kaj funkciigis semajnan kurson kaj akcelitan somer-ferian kurson de Esperanto. En 1928, en Ĉongĉing, alia urbo de Siĉŭan-provinco ĉe la supra baseno de Jangzi-rivero, Li Ĝjanĝong kaj Lu Ĝjanbo, kiu revenis de Ŝanhajo por sin resanigi, aperigis en la ĵurnalo «Ĉŭankang Ĵibaŭ» la felietonon «Verda Stelo» por propagandi kaj disvastigi Esperanton. En 1930 Esperanto-instituto fondiĝis en Ĉongĉing kaj publikigis sian organon. La verdaj semoj de Esperanto dissemiĝis de la urboj Ĉengdu kaj Ĉongĉing al ĉiuj anguloj de la provinco.

En la 30-aj jaroj la Esperantomovado vigle disvolviĝis en Siĉŭan-provinco. Post la fondiĝo de la Ĉengdu-a Esperanto-instituto en 1931, diversformaj Esperantaj kursoj kaj ekspozicioj aperis sinsekve. Kelkaj altaj, mezaj kaj elementaj lernejoj funkciigis en si Esperantajn kursojn. En Ĉengdu stariĝis la librejo Verda Stelo, agentejo por eldonaĵoj de UEA. Krome, la Verd-stela Eldonejo de Siĉŭan-provinco eldonis nombron da libroj, kiaj la ĉin-lingva traduko de «Teorio de Esperanto» de V. Varankin, «Enkonduko de la Internacia Lingvo», «Fonetiko de Esperanto», «Sintakso de Esperanto», la prinotita teatraĵo «Sa-

lome» de O. Wilden kun ĉin-lin-gva traduko kaj «Esperanto por Esperanto» de Lu Ĝjanbo.

Post kiam eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilito en julio, 1937, multaj eminentaj esperantistoj kiaj Ĝang Ĉjiĉeng, Ge Baŭĉjŭan, Le Ĝjaŝjŭan kaj japana esperantistino Verda Majo, kolektiĝis en Siĉŭan-provinco, kaj la loko fariĝis la centro de la ĉina Esperanto-movado dum la milito. En 1941 Je Lajŝi (Ĵelezo), Feng Ŭenlŭo (Venlo Fon), Liŭ Ĵen kaj Ŝju Ŝouĝen (Eltunko), fondis Ĉongĉing-an Korespondan Esperanto-Lernejon, kiu kulturis sume pli ol 2 000 lernantojn en la daŭro de 6 jaroj, malgraŭ plurfoja bombado fare de japanaj aviadiloj kaj aliaj malfaciloj. Tiuj lernantoj poste disiris al 18 provincoj de Ĉinio kaj fariĝis aktivuloj de la ĉina Esperanto-movado. Inter ili troviĝas Li Ŝiĝjun (Laŭlum), vicĉefredaktoro de El Popola Ĉinio kaj membro de la Akademio de Esperanto, kaj Jang Jongsen, la esperantiginto de la ĉina fama romano «Kanto de Juneco». En 1946 la Ĉengdu-a Esperantista Societo transprenis la laboron de la lernejo kaj fondis Ĉengdu-an Korespondan Esperanto-Lernejon kun elementa kaj mezgrada kursoj. Ambaŭ korespondaj lernejoj faris gravan kontribuon al la ĉina Esperanto-movado.

Dum la kontraŭjapana Rezistmilito, sub la gvido de ĉina fama verkisto Ĝŭo Moĵŭo, aperis duonmonata gazeto «Heroldo de Ĉinio» en Ĉongĉing, kiu daŭre eldoniĝis en 74 numeroj. En la sama urbo Ŝju Ŝouĝen publikigis alian gazeton «Ĉina Esperantisto». Ambaŭ gazetoj konigis al diverslandaj esperantistoj kaj popolanoj la kontraŭjapanan batalon de la ĉina popolo kaj trovis legantojn en pli ol 850 urboj de


63 landoj. Krome, en malfavoraj materialaj kondiĉoj dum la milito, ĉinaj progresemaj esperantistoj, per sia ŝparita mono, eldonis en la malfronta provinco Siĉŭan grandan nombron da Esperantaj libroj, inkluzive de «Plena Vortaro Esperanta-Ĉina», «Moderna Vortaro Ĉina-Esperanta», «Klasifika Vortaro de Esperanto», «Gramatiko de Esperanto», «Nova Krestomatio», «La Ĉefa Historio de A-Q», «Patrineto», «La Arĝenta Jubileo de la Literatura Agado de S-ro Kuo Moĵo», «Transformiĝo», «Nova Vivo», «Elektitaj Ĉinaj Kantoj en la Kontraŭjapana Rezistmilito», «Kolekto da Esperantaj Kantoj», «Biografio de D-ro Zamenhof» kaj «Fremdlanda Proverbaro». Tio ne nur akcelis la kulturen interŝanĝon inter Ĉinio kaj aliaj landoj, sed ankaŭ multe progresigis la Esperantomovadon en Siĉŭan-provinco.

Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito la Siĉŭan-aj esperantistoj persistis en sia agado malgraŭ la regado de la kuomintanga reakciularo. Ŝju Ŝouĝen, Li Ŝiĝjun, Lin Lan (Ĉeng Zajhŭa) kaj Fu Ŝjanpej aliĝis al internacia organizo de Esperanto. La Ĉengdu-a Esperantista Societo

estrita de Ŝju Ŝouĝen iniciatis en ĵurnalo felietonon por propagandi kaj disvastigi Esperanton kaj eldonis Esperantajn gazetojn «Ĉinio en Karikaturaj», «El Ĉina Muziko», «Ĵurnalisto» kaj «Nia Rondo», kiuj konigis al fremdlandaj esperantistoj la realan situacion en Ĉinio, malkaŝis la intrigon de la kuomintanga reakciularo pri la enlanda milito kaj raportis la novan vivon de la ĉinaj popolanoj en la liberigitaj regionoj.

Ekde 1934 Ŝju Ŝouĝen sin okupis pri la kontraŭjapana batalo kaj Esperanto-movado en Ŝanhajo, Ŝjian kaj Ĉongĉing kaj pro tio estis arestita de la kuomintanga registaro en 1935. Post sia liberiĝo en 1937 li, kun Esperanto kiel batalilo, daŭrigis sian neflekseblan batalon kontraŭ la kuomintanga reakciularo. Vintre de 1948 li estis refoje arestita. En la malliberejo li daŭre propagandis kaj lernigis Esperanton. Li ĉiamaniere klopodis por akiri informojn pri la revolucia batalo de la popolo, skribis ilin sur papero kaj ĝin cirkuligis inter malliberuloj por instigi ilin al batalo. La 6-an de decembro, 1949, antaŭvespere de la liberiĝo de Ĉengdu, li kaj alia esperantisto

Prof. Lu Ĝjanbo (la tria de maldekstre) kaj vicprof. Ning Ŝouĝen de la Siĉŭan-a Universitato intime interparolas kun dana s-ano Poul Thorsen.



Jang Ĉiŭĝen estis pafmortigitaj de la malamikoj. Antaŭ sia martiriĝo li skribis sur muro de la prizono la Esperantan vorton "Espero", kio montris la sopiron de tiu 35-jara esperantisto al la bela perspektivo de la homaro.

S-ro Hu Juĝi, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj nove elektita membro de la Honora Patrona Komitato de Universala Esperanto-Asocio, diris en la komenco de la 50-aj jaroj: "Ni ne devas forgesi, ke la Esperanto-movado en Ĉinio kreskis sub kruela premado de la reakcia reganta klaso, en malliberejoj kaj koncentrejoj, en kiuj estis enfermitaj niaj revoluciuloj. La nomoj de nemalmultaj esperantistoj troviĝas en la listo de popolaj herooj, kiuj mortis por la revolucio dum la pasintaj 30 jaroj."

La fondiĝo de la nova Ĉinio portis novan vivon ankaŭ al la Esperanto-movado en Siĉŭan-provinco, sed ĝia pli granda disvolviĝo okazis en la lastaj kelkaj jaroj. En la lastaj jaroj la Esperantaj organizoj de la provinco akceptis en sin preskaŭ mil membrojn. Ili funkciigis diversformajn Esperantajn kursojn, simpoziojn, ekspoziciojn, distrajn vesperojn kaj aliajn aktivadojn. Anstataŭ du altlernejoj en la 60-aj jaroj, nun 10 altlernejoj en la provinco havas nedevigajn aŭ progresigajn Esperanto-kursojn. Oktobre de 1983, en la provinca ĉefurbo Ĉengdu fondiĝis Siĉŭan-a Esperanto-Asocio, la unua unuigita organizo de la tut-provincaj esperantistoj en la pasintaj 70 jaroj, post kiam Esperanto enkondukiĝis en la provincon. En la lastaj kelkaj jaroj la provinco gastigis ĉe si 10 esperantistojn el Islando, Jugo-

slavio, Japanio, Nederlando, Britio, Francio, Danlando kaj Aŭstralio. Ĉengdu kaj la franca urbo Montpellier estas amikaj urboj, kaj la esperantistoj de la du urboj starigis inter si amikecan rilaton.

La Ĉengdu-a Esperanto-Asocio kaj la Ĉongĉing-a Esperanto-Asocio estas du grandaj organizoj sub la provinca asocio. En la



Leciono de Esperanto dum la Somera Semajno

pasintaj jaroj la Ĉongĉing-a Esperanto-Asocio, kun 150 membroj kaj multe da Esperanto-amantoj, faris multajn fruktodonajn aktivadojn. Ĝi ne nur fondis lernejajn Esperanto-kursojn, sed ankaŭ funkciigis tri radio-kursojn, kunlabore kun la Ĉongĉing-a Popola Radiostacio, kaj per-gazetan kurson de Esperanto. Por disvastigi Esperanton en Siĉŭan-provinco, kiu havas vastan teritorion kaj grandan loĝantaron, estas efike lernigi la lingvon per radio kaj gazetoj. Ĝis nun ĉirkaŭ 20 000 laboristoj, instruistoj, kadroj, sciencistoj, teknikistoj kaj studentoj en kaj ekster la provinco partoprenis en la lerno. Krome, en la fino de 1982 la asocio fondis la monatan gazeton «Lernado de Esperanto», kiu ĝis

nun eldonis pli ol 300 000 ekzemplerojn kaj eldon-kvante estas unu el la plej grandaj Esperantaj gazetoj de Ĉinio. En 1984 la redakcio de «Lernado de Esperanto» redaktis kaj publikigis pli ol 10 Esperantajn librojn. Aldone, la asocio fondis la ĵurnalon «Voĉo de Esperanto» lastatempe por ĝustatempe komuniki Esperantajn novaĵojn en- kaj ekster-

landajn. Post nelonge en la bela montara urbo Ĉongĉing aperos Ljuĉŭan-Librejo, kiu servos ekskluzive por la eldono kaj distribuado de Esperantaj libroj kaj periodaĵoj.

Ĝuste kiam mi skribas tiun ĉi artikolon, ĝojiga novaĵo venas de Pekino: La Ĉina Esperanto-Ligo decidis transdoni la pokalon Fyne al la Ĉongĉing-a Esperanto-Asocio, kiu akiris rimarkindajn sukcesojn en la disvolvo de Esperanto-movado en la lastaj jaroj. En la nomo de la esperantistoj de Ĉongĉing, vicprofesoro Li Ĵen, vicprezidanto de la Siĉŭan-a Esperanto-Asocio kaj prezidanto de la Ĉongĉing-a Esperanto-Asocio, akceptis la honoran premion.



Venlo Fon en sia hejmo

ĜANG TJANŜIN:

Kanto al lumo

MI ŝatas kanti Esperantan kanton "La Tagiĝo", iam eĉ foje-refoje. Dum la kantado ofte antaŭ mi aperis la sceno, ke kamarado Venlo Fon¹ instruas ĉi tiun kanton en la Koresponda Esperanto-Lernejo de Ĉongĉing.

Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito mi laboris kiel kompostisto de la Esperanta revuo "Heroldo de Ĉinio", en antaŭurbo de Ĉongĉing. En dimanĉa mateno, vintre de 1943, ni kvar kompostistoj kune forlasis nian loĝejon kaj iris en frosta vento kaj pluveto al proksima kabano de la Koresponda Esperanto-Lernejo. Survoje ni renkontiĝis kun kamarado Zeng Hejaŭ² de la redakcio

de "Heroldo de Ĉinio", kaj ni kune iris al KEL.

"Heroldo de Ĉinio" redaktita kaj eldonita de la Kultura Komitato sub la gvido de Ĝuo Moĵŭo³ raportis al eksterlandaj esperantistoj pri la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la liberigitaj regionoj de Ĉinio. Krom la revuo "Heroldo de Ĉinio" kaj aliaj Esperantaj eldonaĵoj, ni kompostis senpage por KEL ankaŭ diversajn librojn, ekz. "Plena Vortaro Esperanta-Ĉina", "Milittempa Legolibro de Esperanto", "Gramatiko de Esperanto", "Kolekto de Esperantaj Kantoj" ktp. En la komuna laboro profunda amikeco stariĝis inter ni kompos-

tistoj kaj kamaradoj Venlo Fon kaj Honfan⁴ de la lernejo. Ili ofte venis al ni por instrui al ni Esperanton kaj Esperantajn kantojn. Ankaŭ ni vizitis ilin en ferioj. Ĉiufoje la gastamaj mastroj akceptis nin afable.

Antaŭtagmeze de iu dimanĉo, ni venis al la kabano de KEL, trapasinte kotan padon en vento kaj pluvo. Kiel antaŭe, la mastroj varme akceptis nin salutante en Esperanto. Poste, ili zorgeme demandis pri nia lernado de Esperanto kaj pacience faris al ni respondon.

Fine, kamarado Venlo Fon proponis: "Ĉu ni daŭre lernu



Verkoj de Venlo Fon

‘La Tagiĝon?’ “Bone!” ni respondis unuvoĉe. Tiam kamarado Venlo Fon staris meze de la ĉambro kaj ekinstruis la kanton, tenante la kantolibron en unu mano kaj batante la taktojn per la alia. Starante ĉirkaŭ li, ni kantis la kanton, frazon post frazo kaj foje-refoje.

Kamarado Venlo Fon estis maldika, mezstatura, afabla, modesta kaj vigla, kun miopulaj okulvitroj sur la maldiketa vizaĝo. Li estis apenaŭ 40-jara, sed jam havis longan barbon, aspektis kiel maljuna profesoro. Oni diris, ke li pasinte estis mezlerneja instruisto de la angla lingvo.

Poste li ekamis Esperanton kaj decidis forlasi sian instruistan profesion kaj sin okupi pri la granda afero komencita de Doktoro Zamenhof. Ekde tiam, li volonte eltenis diversajn malfacilojn kaj diligente, sinofere klopodis por la Esperanta movado. Li estis multe estimata de tiamaj esperantistoj pro sia persistemo kaj nobla spirito en la Esperanta aktivado.

Post kiam ni ellernis la kanton frazon post frazo, kamarado Venlo Fon komencis peti nin kune kanti. Sekvante liajn manĝestojn kaj klaran kaj belan bari-tonon, ni ĉiuj laŭte kantis:

Agordu la brustojn ho nia fratar’,

Por nova pli vigla jam kanto!

Ĝi sonu potence de montoj al mar’,

Anoncu al ĉiu dormanto:

Tagiĝo, tagiĝo radias en rond’,

La ombroj de l’ nokto forkur- ras el mond’!

La kortuŝa kantado leviĝis al la ĉielo, ŝvebis super la nubo, kaj flugis al la malproksimo! Ĝi vidigis al ni lumon kaj esperon, kuraĝigis nin venki ĉiujn malfacilojn kaj bonvenigi la tagiĝon de la nova Ĉinio!

La 5-a de februaro ĉi-jare estas la sesa datreveno de la forpaso de kamarado Venlo Fon. Mi oferu ĉi tiun mallongan artikolon, kiel bukedon da freŝaj floroj al mia estimata instruisto.

1. Venlo Fon estis fama ĉina esperantisto, kompilis “Plenan Vortaron Esperantan-Ĉinan”, “Esperanto-Kurson” ktp.

2. Zeng Hejaŭ estas ĝenerala sekretario de la Pekina Esperanto-Asocio.


3. Ĝjo Moĵuo estis fama ĉina verkisto, poeto, historiisto kaj politikisto.

4. Honĵan, Gang Hongĵan, estas fama veterana esperantisto de Ĉinio.

KARIKATURO

Revivigita

de ĜI NANPING



ANONCO

La redakcio de “El Popola Ĉinio” bezonas Esperantajn poŝtmarkojn. Kiuj bonvolas cedi al ĝi siajn posedaĵojn, bonvolu skribi al ĝi pri dezirata rekompenco.


**NASKIĜIS «VOĈO DE
ESPERANTO»**

La duonmonata ĉinlingva gazeto «Voĉo de Esperanto» fondita de la Ĉongĉing-a Esperanto-Asocio aperis en novembro 1984, kun kvaronfolia formato, kvar paĝoj. Por akceli sanan disvolviĝon de la enlanda Esperanta movado, ĝi ĝustatempe informas pri Esperanta movado enlanda kaj eksterlanda, interŝanĝas spertojn pri lernado de Esperanto kaj pri Esperanta movado, konigas la historion de Esperanto kaj famajn esperantistojn, recenzas esperantajn librojn kaj gazetojn kaj donas informojn pri Esperanto. Ĝia unua numero kun 100 000 ekzempleroj kaj ĝiaj sekvontaj du numeroj estos senpage haveblaj por diverslokaj ĉinaj esperantistoj.

**ESPERANTO EN ĈINAJ
ALTLERNEJOJ**

Post la Orient-Ĉinia Instruista Universitato, la Centra-Ĉinia Instruista Instituto, la Siĉŭan-a Universitato, la Ĉengdu-a Universitato, la Ĝjnan-a Universitato, la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, la Anhuja Universitato, la Uhan-a

Renkontiĝo de lernantoj de Esperanto-kurso de Fudan-universitato de Ŝanhajo kaj junaj japanaj esperantistoj



Ĉeestantoj de la inaŭguro de la Ĉjŭanĝoŭ-a Esperanto-Asocio

Universitato, la Langŭoŭ-a Universitato kaj aliaj 11 altlernejoj, en 1984 ekprenis Esperanton kiel devigan aŭ nedevigan lernobjekton ankaŭ la Ŝandong-a Universitato, la Ŝjamen-a Universitato, la Fudan-a Universitato, la Junnan-a Universitato, la Daljan-a Politekniko, la Hefeja Politekniko, la Fuĝjan-a Agronomia Instituto, la Ĝjangŝji-a Ĉin-medicina Instituto, la Ŝandong-a Instruista Universitato kaj la Hefeja Fremdlingva Kolegio. Plejparto de la kursoj iras tri aŭ kvar horojn ĉiusemajne. Ili daŭros unu aŭ du jarojn.

**ESPERANTO-ORGANIZOJ
NOVE STARIGITAJ**

Depost la fino de aŭgusto 1984, en iuj urboj de Ĉinio fondiĝis Esperanto-organizo. Inter ili estas la Sciencista kaj Teknikista Es-

peranto-Asocio de la Ŝenjang-a Filio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, la Ĉjŭanĝoŭ-a Esperanto-Asocio, la Lŭojang-a Esperanto-Asocio, la Ŝaŝi-a Esperanto-Asocio, la prepara grupo de la Ningbo-a Esperanto-Asocio kaj tiu de la Ŝjamen-a Esperanto-Asocio. Ili troviĝas en famaj historiaj kaj kulturaj urboj, en novaj industriaj urboj aŭ en ĵus malfermitaj havenurboj. Ilia fondiĝo ricevis subtenon de la lokaj registaroj kaj famuloj kaj certe akcelos la lokan Esperantan movadon. Kaj gvidantoj de tiuj urboj ĉeestis la inaŭguron.

**«GRAMATIKAJ PUNKTOJ DE
ESPERANTO» PREMIITA**

«Gramatikaj Punktoj de Esperanto» kompilita kaj eldonita de la redakcio de «Lernado de Esperanto» de Ĉongĉing lastatempe ricevis triagradan premion de scienc-esplora frukto de Siĉŭan-provinco en la kampo de filozofio kaj sociologio. Tian premion oni unuafoje faris post la fondiĝo de la nova Ĉinio kaj ankaŭ unuafoje por Esperanta verko. Tiu libro kun eldonkvanto de 60 000 ekzempleroj konsistas el 71 artikoloj pri Esperanta gramatiko. Pro facileco ĝi estas varme bonvenigata de komencantoj.

**DUA ESPERANTO-
RENKONTIĜO DE
VENEZUELO**

Dum la 12-14-a de oktobro 1984 okazis en Karakaso, la ĉefurbo de

Venezuelo, la dua Esperanto-renkontiĝo kun ĉeesto de enlandaj esperantistoj. Oni diskutis pri la Internacia Festivalo pri Komunikado kaj Kulturo okazanta en 1987 por celebri la centjariĝon de Esperanto.

LA 12-A KONGRESO DE LA NATURAMIKA INTERNACIO

La kongreso okazis de la 20-a ĝis la 23-a de sept. 1984 en la Eŭropa Palaco en Strasburgo kaj traktis post detala diskuto proponon de la Landa Grupo, F. R. Germanio sub la titolo: "Savu la Pacon". Oni postulis, ke tiu propono estu disvastigata ne nur en naciaj lingvoj, sed ankaŭ en la internacia lingvo Esperanto.

La Naturamika Movado, naskiĝinta en 1895 en Vieno, estas parto de la laborista movado. Jam de pluraj jardekoj ĝi aktive subtenas Esperanton.

INTENSIVA ELEMENTA E-KURSO

Kadre de la 11-a Esperanto-Renkontiĝo en la urbo Porto Alegre, Brazilo, en sept. 1984 okazis intensiva elementa kurso kun la apogo de la subsekretario pri kulturo de la urba estraro. Enskribiĝis 22 gelnantoj, kiuj akurate ĉeestis ĉiujn lecionojn, kaj ili sin anoncis por daŭrigi sian lernadon. La kursgvidanto estis s-ro Enrique Kohei, ĉindevena argentinano. La ĵurna-

loj kaj radiaj kaj televidaj stacioj amplekse informis tion kaj tiel la tuta loĝantaro de la urbo sciis pri tiu intensiva kurso.

TURISMAJ BROŝUROJ EN ESPERANTO

1. La kultura konsilantaro de la Valencia urbestro akceptis eldoni esperantlingve tri broŝurojn pri Valencio: "Historio kaj Arto", "Vojaĝplanoj" kaj "Festoj kaj Gastronomio". Tiu, kiu deziras ricevi senpage tiajn broŝurojn, povas direkti sin al Esperanto-Grupo Valencio, Gran Via Fernando el Catolico, 45-3, Valencia-8, Hispanio.

2. Dank' al la Sevilja Urbodomo kaj okaze de la 44-a Hispana Kongreso de Esperanto, eldoniĝis kvar luksaj esperantlingvaj broŝuroj pri la urbo Seviljo. Se vi volas ekzemplerojn, bonvolu mendi rekte kaj senpage ĉe la jena adreso:

Excmo. Ayuntamiento (Turismo), Plaza Nueva, 1, Sevilja-1, Hispanio.

REZULTOJ DE POEZIA KONKURSO

La rezultoj de la poezia konkurso, kiun organizis Triesta Esperanto-Asocio kaj partoprenis 30 poemoj el 12 landoj, estas publikigitaj la 25-an de sept. 1984.

Jen la pli alte taksitaj 6 poemoj:

1-a premio al poemo "Maja Tago" de Rejna de Jong, Nederlando;


2-a premio al poemoj "La Blinda Infano" de Pierisa Cavallero, Italio kaj "Doloro" de Eli Urbanova, Ĉeĥoslovakio.

3-a premio al poemoj "Papilioj" de Tibor Bessenyei, Hungario, "Kial" de Ada Aceto, Italio kaj "Aĝoj" de Lucia Miano, Italio.

La foto montras la Esperanto-Klubon "Espero" de Pollando, kiu gastigis gesamideanojn el Hungario la 3-an de junio 1984.



Britaj esperantistoj s-ro Bertram Russell (dekstre) kaj s-ro W. F. Knight okazigas en sia hejmurbo Esperanto-ekspozicion, en kiu troviĝas ankaŭ ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj.



La Rosania Esperanto-Asocio de Meksikio festas sian 50-an datrevenon.



Lang Ping en cervobredejo

Post reveno de Los-Anĝeleso

de HUI VEN

EN aŭgusto pasintjare, kun la ora medalo, la knabinoj de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo revenis al Pekino de la 23-aj Olimpikoj okazintaj en Los-Anĝeleso. Tuj post la celebra kunveno ili forveturis al sia hejmloko por viziti siajn familianojn. Lang Ping, ĉefatakanto de la teamo konata kiel "Fera Martelo", estas pekinano. Tia vojaĝo tute ne koncernis ŝin, sed ankaŭ ŝi haste enŝovis la vestojn kaj aliajn ĉiutagajn bezonaĵojn en sian valizon kaj zorgeme kovris la liton per tuko. Ĉu ankaŭ ŝi devus vojaĝi foren?

Ne. Iu personaŭto fulmorapide veturigis Lang Ping al la Ĉefurba Hospitalo. Akompanate de la teama kuracisto ŝi haste eniris la ĥirurgian malsanulejon. Tie ŝi devis ricevi operacion de apendic-ektomio.


Lang Ping suferis de kronika apendicito jam pli ol du jarojn. Por ke ne estu malhelpataj la trejnado kaj konkurso, kiam la malsano ripetiĝis,

ŝi ricevis injekton kaj prenis medikamenton. Kompreneble, tio ne tute forigis la malsanon. Nun venis al ŝi la ŝanco. Ŝi havis feriojn de dekkel-kaj tagoj. Sekve, ŝi decidis pasigi la feriojn en hospitalo.

Kvankam Lang Ping enhospitaliĝis tute ne rimarkite, tamen la informo rapide disvastiĝis. La kuracistoj kaj malsanuloj ĉiuj deziris, se eble, rigardi ŝin kaj peti ŝin surskribi. Tio forte maltrankviligis la gvidantojn de la hospitalo. Por ke la knabino povu kviete ripozi kaj la kuracado iru bonorde, ili kuŝigis ŝin en aparta ĉambro kaj speciale sendis devokonscian flegistinon garddeĵori ĉe ŝia pordo. Laŭ la diro de Lang Ping, tiu flegistino estas tre severa kaj malkompatema. Sen ŝia permeso neniu povis eniri la ĉambron. Ankaŭ kuracisto ne estis escepto. Foje, iu juna kuracisto haste sin direktis al la ĉambro de Lang Ping. La flegistino tuj lin haltigis kaj demandis: "Kion



Hoŭ Juĝu, Li Janĝjun, Lang Ping kaj Ĝoŭ Ŝjaŭlan (de maldekstre) en jurto




En boato

vi volas?" "Mi, mi estas la ĉefkuracisto de Lang Ping!" laŭte respondis la malaltastatura kuracisto kun levita kapo. "Ne trompu min. Ĵus du faris la samon kun la sama preteksto." Svingante la manon, la flegistino ordonis lin tuj foriri.


La kuracisto konfuziĝis kaj ne sciis kion fari. Subite li ekpensis: "Mi havas legitimilon, mi havas legitimilon!" Li elpoŝigis kaj prezentis ĝin al la flegistino. La lasta ŝanĝis sian tonon kaj

ĝentile diris: "Bonvolu eniri!" Fakte, li estis helpanto de la direktoro de la hospitalo, kiu persone faris la operacion al Lang Ping.

Alifoje venis al la hospitalo junulo altastatura kaj beleta. Al la severa flegistino li timeme sin prezentis kaj diris, ke li deziras viziti Lang Ping. La flegistino lin rigardis de la kapo ĝis la piedoj. Jen la junulo estas diskreta kaj ĝentila, ŝajnas, ke li ne trompas. Tamen ŝi ne tuj donis



Trejnistoj Jŭan Ŝejmin donas sian nomon al flugpilkaĵamatoroj.



Ĉinaj flugpilkistinoj Lang Ping, Li Janĝjun kaj Goŭ Sjaŭlan (de maldekstre en la antaŭa vico), kaj Jang Sjaŭĝjun, Jang Ŝjilan kaj Hoŭ Juĝu (de maldekstre en la malantaŭa vico) en mongolaj kostumoj

al li la permeson. Ŝi petis la junulon atendi momenton, kuris al Lang Ping kaj flustre demandis al ŝi: “Junulo Baj Fan deziras vin vidi. Ĉu vi donu al li apartan favoron?” Lang Ping honteme ride-tis kaj ruĝo ekludis sur ŝiaj vangoj. La saĝa fle-gistino rapide eliris kaj diris al ĉiuj atendantoj: “Cedu vojon, ke la junulo eniru!” Kun enviaj okuloj ili vidis la junulon eniri en la ĉam-bron.

La junulo antaŭe estis elstara sportisto. Pro vundiĝo li devis fini sian sportistan vivon kaj ekstudis en alta lernejo. Nun li jam diplomitiĝis el la Pekina Instituto de Internaciaj Rilatoj. Same kiel Lang Ping, ankaŭ li havas fortan aspiron al sia kariero. Ili amas la vivon, havas vastan in-teresiĝon kaj sin tenas malkaŝemaj kaj serenaj. Ĉiufoje, kiam ili renkontiĝis, ili havis multajn vor-tojn por diri. Kiam la teamo vojaĝis eksterlan-den, la junulo neniel povis sin kvietigi ĝis la fino de la konkurso. Antaŭ la preparkonkurso inter la teamoj ĉina kaj usona en la 23-aj Olimpikoj, li aĉetis abundon da biero por plezure tosti kun siaj amikoj post la venko de la ĉina teamo. Ne-atendite, la ĉina teamo perdis la matĉon. Ĉiuj ege malĝojis. Kaj la junulo des pli maltrankviliĝis por la ĉinaj knabinoj, tamen li malkorkis ĉiujn botelojn kaj invitis la amikojn trinki por antaŭ-tosti al la finaj sukcesoj de la ĉina teamo. Vere la ĉina teamo venkis la japanan en la duonfinalo kaj la usonan en la finalo. La junulo do invitis siajn amikojn al restoracio kaj gaje aranĝis feste-non pro la venko.

Sidante sur la lito, Lang Ping absorbite aŭs-kultis la interesan rakonton de la junulo kaj havis grandan ĝojon pro tio. Ŝi sentis sin feliĉa, ĉar ŝi havas junulon, kiu bone komprenas ŝin, kaj tiom pli, ŝia koro ligiĝas kun la koroj de tiom da junu-loj.

En pitoreskejo



El leteroj de legantoj

Ni ĉiam dankeme atendas leterojn de niaj legantoj, ĉar iliaj laŭdoj kuraĝigas nin marŝi antaŭen, kaj iliaj kritikoj kaj proponoj estas multe pli utilaj al plibonigo de nia revuo. Ni daŭre publikigos koncize leterojn de niaj legantoj, kiel oni proponis.

— LA RED.

Ekde tri jaroj mi estas abonanto de EPĈ. Mi ĝin tute legas. Kiel brazilano, mi povas diri, ke mi konas, pere de EPĈ, vian grandan, miljaran kaj belan landon.

M.R.N. (Brazilo)

Tipografie kaj pres-arte mi ĉiun fojon miras kaj admiras pri la eldono. Ofte mi montras ĝin al gevizitantoj hejme kaj fieras pri ĝi, kvazaŭ mi estas la eldonisto, presisto, kompilisto, fotografisto, pentristo, desegnisto, redaktoro kaj alia ora isto!

H. R. (Nederlando)

Certe ĉiu leganto trovas en ĉiu numero de EPĈ artikolojn, kiuj interesas, kiel vi pensis, ĉiujn, ĉu komencantojn, malsanulojn, interesulojn por historio, sporto ktp.

J. W. (Germana F. R.)

Al mi tre plaĉas tio, ke ĝenerale la lingvaĵo de EPĈ ne sekvas la "okcidentajn modojn", tio estas, ĝi estas laŭ la izolanta-aglutinema strukturo de Esperanto. Laŭ mi tio ĉi estas tre grava punkto, ĉar la influo de la eŭropaj fandaj lingvoj bremsas la plenan disvolviĝon de strukturaj ecoj de Esperanto.

H. R. (Portugaliao)

Multe plaĉas al mi la rubriko "Niaj Perantoj", sendube ĉiu homo, kiu laboras por la disvastigado de la Esperanta movado, meritas nian miron, do mi proponas krei spacon "Pri mia vivo" por la direktantoj de Esperantaj organizoj kaj eĉ por simplaj esperantistoj de Ĉinio kaj eksterlando. Tiel ni konus diversajn samideanojn kaj EPĈ fariĝus pli internacia.

M.S.T. (Ĉilio)

Mi estas ravita pro viaj novaj rubrikoj: "Por via sano" kaj "Ĉinlingva kurso". Ni, en nia E-klubo, interesiĝas pri orienta kulturo. La ekzercojn, kiuj aperas en via revuo, ni faras, kaj ni estas kontentaj.

L.S. (Pollando)

Mi opinias, ke artikoloj pri religiaj aferoj estas bonaj, speciale pri la progreso de la kristana religio en Ĉinio. Sendube, multaj aliaj kristanoj ĝuas ankaŭ.

S. M. (Novzelando)

Io mankas miaopinie: Ĉu vi povus instali la rubrikon "Leteroj al la redakcio"? Tiel povus ekfariĝi dialogo inter legantoj kaj la redakcio.

H. V. H. (Germana F.R.)

Multe plaĉas al mi pedagogio, kion enhavas nia "El Popola Ĉinio" kaj fotaj artikoloj pri vivo de la ĉina popolo. Mi esperas, ke EPĈ estos ankoraŭ tiel interesa kaj instrua.

M. T. (Jugoslavio)

Mi ŝatus legi en via revuo pli da literaturaĵoj, kaj entute man-

kas al mi poezio. Ĉinio estas konata kiel lando kun malnova kulturo. Mi opinias, ke via literaturo malnova kaj nova pliriĝigus vian revuon kaj ankaŭ esperantan tradukan literaturon.

A. L. (Ĉeĥoslovakio)

Laŭ mia opinio unu el la plej gravaj taskoj de EPĈ estas konigi, prezigi Ĉinion. Vi povus fari kelkajn seriojn, kiuj prezentas al alilandanoj ĉinajn aĵojn aŭ aferojn, ekzemple ĉinajn planojn, ĉinajn bestojn, kiujn vi prezentas al ni kiel oni ilin manĝas, ĉinajn trinkaĵojn, festojn ktp.

J. E. (Hungario)

La nura manko, laŭ mi, estas: ne sufiĉe da fotografaĵoj koloraj pri la ĉiutaga vivo en urboj, la butikumado ktp.

A. C. (Belgio)

Salutinda iniciato — humuro (ĉina) povus ankoraŭ agrabli la revuon.

M. H. (Francio)

La lingvaĵo de EPĈ estas klara, facile komprenebla, sed laŭ mi, por helpi la legantojn, klarigo de kelkaj vortoj estos necesa post longaj artikoloj, precipe klarigo de novaj vortoj.

R. F. (Madagaskaro)

Mi ne ŝatas tiun aranĝon, ke artikolo komencas en la unuaj paĝoj de la revuo kaj daŭras en la lastaj paĝoj.

J. S. C. (Brazilo)


Estu pli da mallongaj artikoloj pri Ĉinio! Longaj artikoloj laciĝas tiujn, kiuj ne tute posedas la fakbranĉon kaj fakesprimojn.

J. S. (Jugoslavio)

Ŝjian, natura muzeo de la ĉina historio

de ŬANG GAŬLIN

Fotoj de ŬEJ ŬANGŜJANG



La pagodo Dajan en aŭtuno

EMINENTA ĉinologo de iu eksterlanda universitato diris al sia studento vojaĝonta al Ĉinio: “Post Pekino, la ĉefurbo de Ĉinio, vi devas viziti Ŝjian, la antikvan urbon de la orienta kulturo, kie estas ‘natura muzeo’ de Ĉinio. Ĝi povas pli konkrete kaj pli figure konigi al vi tiun antikvan landon kun civilizacia historio de miloj da jaroj.”

Ŝjian situas en la centro de Ĉinio, kie troviĝas la baseno de la Flava Rivero, unu el la luliloj de la antikva kulturo de Ĉinio. De tie komenciĝis la fama Silka Vojo.

Fininte sian viziton al Ŝjian, la estro de la Sveda Kultur-ronda Vizitgrupo al Ĉinio diris kun admiro: “En Ŝjian ni vidis tri etapojn de la longa historio — primitivan, sklavan kaj feŭdan sociojn.” Tie vere konserviĝas kulturaj restaĵoj de la diversaj historiaj etapoj de Ĉinio, kio estas malofte vidata en la disvolviĝo de urboj ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en aliaj landoj de la mondo. Banpo-vilaĝo, dek kilometrojn for de la nuna urbo Ŝjian, estis loĝejo de membroj de la matriarka klana komunumo antaŭ 6 000 jaroj. Ĝuste sur la loko konstruiĝis la ĉina unua Muzeo de Ruino de Primitiva Socio. La Sklavisma Okcidenta Ĝoŭ-

dinastio antaŭ 3 000 jaroj konstruis du ĉefurbojn Feng kaj Haŭ ambaŭborde de Fenghe-rivero okcidente de Ŝjian. Ekde la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio, Ŝjian estis la ĉefurbo de 11 dinastioj en la daŭro de pli ol 1 100 jaroj, kaj fariĝis urbo, kiu plej frue servis kiel ĉefurbo kaj havis plej longan tempon por esti tia urbo inter la ses antikvaj ĉefurboj de Ĉinio. Kaj en la 30-aj jaroj de la kuranta jarcento, Ĝang Ŝjŭeliang kaj Jang Huĉeng, famaj patriotaj generaloj de Ĉinio, arestis tie la tiaman reganton Ĝjang Ĝjeŝi kaj devigis lin ĉesigi la internan militon subpremantan la popolon kaj alianciĝi kun la Komunista Partio de Ĉinio en la rezisto kontraŭ la japana agreso. Jen la Ŝjian-a Evento grave influanta la modernan historion de Ĉinio. Ĝi postlasis grandan nombron da memoraĵoj lokoj kaj objektoj en la urbo. Ne estas senkaŭze, ke multaj eksterlandaj vizitantoj diris unuvoĉe: “Se oni ne vizitas Ŝjian, oni ne povas ĝuste koni la pasintecon kaj nuntempon de Ĉinio.”

Eksterlande, kiam oni mencias pri Ŝjian, oni nature rememoras la argilajn soldatojn kaj ĉevalojn de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio. Enirinte en la eksponhalon, oni povas vidi en la kavo granda kiel 40 korbopilkaj lud-

kampoj grandiozan batalan formacion: en vicoj staras ĉ. mil argilaj soldatoj en grandeco de vera homo kaj granda nombro da argilaj ĉevaloj kaj ĉaroj. Ili ĉiuj estas vivoveraj, diversformaj kaj ekstreme delikataj. Ne estas mirinde diri: “Kiu ne vidas piramidojn, tiu ne vere vidas Egiption; kiu ne vidas argilajn soldatojn kaj ĉevalojn, tiu ne vere vidas Ĉinion.” En la lastaj jaroj la halo proviziĝis je alia valora trezoro. En la fino de 1980 elteriĝis ĉe la okcidenta parto de la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio kolorigitaj bronzaĵoj ĉaro kaj ĉevaloj, kiuj estis ekspoziciataj post riparado en speciala halo. La ĉaro estas la plej granda, plej antikva kaj plej kompleksa bronza ĉaro en Ĉinio. Miloj kaj miloj da turistoj estis altirataj ĉiutage.

La Okcidenta Han-dinastio (206 a. K. — 24 p. K.) kaj Tang-dinastio (618—907 p. K.) estis la plej prosperaj periodoj en la antikva Ĉinio. Kiel la ĉefurbo de tiuj du dinastioj Ŝjian (tiam nomata Ĉang’an) estis la plej granda urbo en la tiam mondo, kun kiu povis rivali nur la tiam Romo. La ruinoj de la urbomuroj kaj palacoj de imperiestroj en Han- kaj Tang-dinastioj estis ordigitaj kaj riparitaj unu post alia



Vendejo de metiartaĵoj por turistoj

post kiam fondiĝis la nova Ĉinio en 1949. Parto de ili jam reaktoris sian originan formon kaj malfermiĝis al vizitantoj. Krome, en kaj ekster Ŝjian troviĝas ankaŭ pli ol 70 maŭzoleoj de antikvaj imperiestroj, kiel la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio, imperiestro Udi de Han-dinastio, imperiestro Tajzong kaj imperiestro U Zetjan de Tang-dinastio, k. a. Hŭaĉingĉi, ĝardeno de imperiestro Ŝjŭanzong de Tang-dinastio kaj lia plej amata kromedzino Jang Juhŭan, Pagodoj Dajan kaj Ŝjaŭjan konstruitaj en Tang-dinastio, Sonoril-turo kaj Tambur-turo konstruitaj en Ming-dinastio (1368—1644) kaj Stelearo de Song-dinastio (960—1279), la plej granda ŝtona biblioteko de Ĉinio, ĉiuj estis riparitaj kaj malfermitaj al la publiko. Ĉinio faris grandan penadon por protekti la antikvan civilizacion, kio estas multe laŭdata de diverslandaj turistoj.

En la urbo troviĝas ankoraŭ historia restaĵo fierinda, nome urbomuroj kun periferio de 13.6 km., konstruitaj de Ming-dinastio antaŭ 600 jaroj. Ili estas la unikaj grandaj antikvaj muroj bone konservataj en Ĉinio. Ekde la printempo de 1983 oni faris en Ŝjian grandskalan riparadon

al ĉi tiuj valoraj antikvaj konstruaĵoj kaj, surbaze de tio, komencis konstrui ĉirkaŭurban parkon de partikulara stilo. Nun la suda parto de la parko jam finkonstruiĝis kaj malfermiĝis al la publiko. La kvar riparitaj pordoturoj de la urbomuroj, ĉiu kun kvar pordoj, estas uzataj kiel historiaj muzeoj kaj montrejoj de historiaj restaĵoj; sur la urbomuroj estos metitaj ŝtonaj ĉizaĵoj, tabloj kaj taburetoj, skulptaĵoj, antikvaj armiloj kaj floroj. Starante sur la urbomuroj, oni havas panoraman vidon de la pejzaĝo en kaj ekster la urbo. La ĉirkaŭurba rivero estas larĝigita kaj profundigita sur kiu junuloj povos remi, kaj sub la ombraj arboj maljunuloj povos fiŝhoki. En la ĉirkaŭurbaj boskoj, inter la urbomuroj kaj rivero, konstruiĝos kioskoj, terasoj, koridoroj kaj pavilonoj. La parko kompletiĝos en 1986. Kiel bela floringo ĝi faros la antikvan urbon Ŝjian pli bela.

Por heredi la eminentajn kulturajn tradiciojn de Ĉinio, la Ŝenŝji-a Ensemblo verkis imite la "Muzikon kaj Dancon de Tang-dinastio" kaj "Muzikon kaj Dancon en Ĉang'an de Tang-dinastio" en malsamaj stiloj, kiuj ree prezentas la kortegajn kaj

popolajn muzikojn kaj dancojn de la prospera Tang-dinastio.

Ŝjian jam fariĝis mondfama turisma vidindejo karakterizita per historiaj restaĵoj. Por akcepti fremdlandanojn al Ĉinio, en la lastaj jaroj oni konstruis Hotelojn Ŝjian, Ĉang'an en nacia arkitekturo kaj Restoracion Ĉindu. Aparte menciinde estas, ke Ĝinhŭa-Hotelo, la unua entrepreno en Ŝjian kune administrata de Ĉinio kaj fremdlando, estas la plej granda en Ŝjian kun modernaj ekipaĵoj. Ĝi ekservos en 1985.

Gastronomio de Ĉinio estas vere distingiĝa en la mondo. La kuirarto de Ŝjian altiras ĉinajn kaj fremdlandajn gastojn pro siaj longhistoriaj kortega kaj popola manieroj. "Pejzaĝa Festeno" estas preparita laŭ la ok pejzaĝoj de la antikva Ĉang'an. Ĉe tia festeno, la gastoj plezuriĝas ne nur de la frandaĵo, sed ankaŭ de la bela pejzaĝo de la urbo. Krome, la "Kortega Festeno el 58 Pladoj" de Tang-dinastio kaj dolĉa bongusta osmantovino, kiu siatempe plaĉis al Li Baj, la granda poeto de Tang-dinastio, plezurigas niajn gastojn venintajn de malproksime.

Kiam turistoj forlasas Ŝjian, ili aĉetas tie memoraĵojn por donaci ilin al siaj karuloj. Al ili estas bonvena la "Ŝjian-veŝto" el ruĝa manteksita ŝtofo, kiu surhavas bele broditajn bestetojn plenajn de popola gusto kaj orienta ĝenro. Krome, multe plaĉas al turistoj ankaŭ la metiartaĵoj kun peza nacia karaktero produktitaj en Ŝjian kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kiel ekzemple, argilaj skulptaĵoj, papertondaĵoj, ombroteatraj siluetoj, porcelanaj bovloj kun verdetaj desegnoj kaj reproduktaĵoj de trikoloraj ceramikaĵoj de Tang-dinastio kaj argilaj soldatoj kaj ĉevaloj de Ĉin-dinastio.



En la Muzeo de Argilaj Militistoj kaj Ĉevaloj de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio



Antikva sonoril-turo en la urbocentro



La hotelo Ĉang'an kun
dinastia arkitektura stilo



Festeno
Tang-dinastia
stilo

Pejzaĝo de Hŭaĉingĉi

Foto de LAŬ BA



Popolaj metiartaĵoj plaĉaj al eksterlandaj turistoj



Fang-
o

reparita imite al
stia kortega kuirar-

Granda Scenejo en la Somera Palaco


de JAŬ TJANŜIN

Fotoj de ĜJANG ĜINGJU kaj TJAN FENG



Granda scenejo denove farbita

Plafona ornamo de Jile-halo




Trono disponita de la Imperiestra Patrino Ciŝji por rigardo de teatraĵo



LA scenejo en la korto Dehe en la mondfama Somera Palaco en Pekino estas la plej granda el la konservataj scenejoj en la historio de Ĉinio. Oni konstruis ĝin speciale por ludi teatraĵojn por la Ĉing-dinastia imperiestra patrino Ciŝji (1835—1908) en la lastaj jaroj de la 19-a jarcento. La konstruado daŭris de 1891 ĝis 1894, konsuminte 710 000 taelojn da arĝento.

La grandioza scenejo, 21 metrojn alta, konsistas ĉefe el vestoŝanĝejo kaj trietaĝa scenejo kaj ĝia plej supra etaĝo havas tri vinĉ-puliojn por ludado de ĉieliro kaj veturo per nuboj fare de dioj. Sub la teretaĝo estas kvin putoj, kiuj povas estigi resonancan efikon dum kantado, kaj pli grave favoras por prezenti akvoartifikon kaj ĵongladon.

Dum sia 48-jara regado, la imperiestra patrino Ciŝji ne nur ŝatis spektakli teatraĵojn, sed ankaŭ kapablis redakti kaj kompili



La pordo de Jile-halo

ilin. La unuafoja prezentado sur la scenejo estis en julio, 1895. Ciŝji rigardis tie pli ol 200 teatraĵojn kun enhavoj plejparte elektitaj el la historiaj rakontoj

kaj famkonataj ĉinaj literaturaj verkoj, sed ilin la redaktantoj adaptis al laŭdo de la meritoj de la regantoj kaj la t.n. paco kaj prospero. Dum la kantado la aktoroj devis eviti la vortojn tabuitajn de Ciŝji, alie ili estis severe punataj.

Vaksa statuo de Ciŝji







Ciŝji rigardis teatraĵojn sidante sur la malmola sed kusenita trono orita kaj inkrustita per klotoneo en la centro de Jile-halo kontraŭ la scenejo, dum imperiestro Gŭangŝju (1875 — 1908) kaj lia edzino sur flave kusenitaj seĝoj ambaŭflanke de Ciŝji, kaj la korteganoj sidis sub la alero oriente kaj okcidente de la centro, rigore laŭ la rangoj. Antaŭ la komenciĝo de prezentado la korteganoj devis fari genuiĝon kaj kvinfoje adorkliniĝojn antaŭ Ciŝji kaj Gŭangŝju. En la paŭzo de la prezentado ili povis preni manĝaĵon, vinon kaj fruktojn en la difinita halo. Se Ciŝji estis en bona humoro, ŝi donacis al ili rondajn ventumilojn, ŝtofojn, kaligrafiaĵojn kaj pentraĵojn faritajn de ŝi aŭ de imperiestro, kaj



Turistoj en antikvaj vestoj por fotado

tiam la korteganoj devis danki ŝin per adorkliniĝo. Ordinare la prezentado daŭris de la 9-a matene ĝis vespero. Post prezentado en sunperiodaj tagoj kaj festoj oni aranĝis diversajn tradiciajn amuzadojn. Post teatraĵoj je la 15-a tago de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro oni elmontris diversformajn lanternojn, kiaj drakaj, floraj, nubformaj k. a. La drak-lanterno plej plaĉis al Ciŝji. La drak-lanterno konsistis el du drakoj sep metrojn longaj. La drakoj estis kondukataj de po unu ludanto kun silka pilko en la manoj. La draka lanterno estis subtenata de pli ol dek homoj kaj dancanta laŭ la direktado de la pilko. Post la ludado Ciŝji ordonis disĵeti arĝentajn ingotojn en la korton por ke la ludantoj ilin konkure kaptu, kion Ciŝji rigardis kiel plezuron. La ludado ofte daŭris ĝis noktomezo.

Nun la scenejo nove lakita aspektas pli impona kaj orbrila. En Jile-halo estas vaksaj statuoj de Ciŝji kaj imperiestraj edzino kaj kromedzinoj. Tie turistoj povas sin foti alivestitaj per antikvaj teatraj kostumoj kaj ricevi memorigaĵojn donitajn de la laborantoj en Ĉing-dinastia kostumo.



La unua blinda romanisto de Ĉinio

de HŪA ŬEN

BLINDULO Ĝeng Ĵongĉen akiris ĝojindan sukceson en la elira ekzameno de universitato. Poste li komencis verki romanon "Amo al Bivo", kiu priskribas la vivon de blinda muzikisto, plenan de mizeroj kaj ĝojoj. Nun li jam finis la romanon kun 270 000 brajlaĵoj.

Ĝeng Ĵongĉen aĝas 39 jarojn. Li fariĝis blinda pro morbilo en la aĝo de unu kaj duona jaroj. Kiam li havis 11 jarojn, li komencis lerni en porblindula lernejo de Pekino. En malpli ol du jaroj li lernis el ĉiuj brajlaj libroj de la lerneja biblioteko. Poste li ekamis muzikon kaj eller-

nis ludi violonon kaj pianon. Malfeliĉe, liaj maldekstraj brako kaj montrofinĝro vundiĝis en akcidento, tio forvaporigis lian revon fariĝi blinda muzikisto.

Ĝeng Ĵongĉen tamen ne perdis kuraĝon. Li persiste finis sian lernadon en mezlernejo kaj ekinteresigis pri literaturo. En 1964 li fariĝis instruisto de postlabora lernejo por blindaj oficistoj kaj laboristoj en Tjanĝin.


Dek jarojn poste, la 29-jara Ĝeng Ĵongĉen edziĝis al bonedukita knabino Jin Juping. En ĉ. kvar jaroj post la geedziĝo ŝi voĉlegis por sia edzo centojn da literaturaj verkoj, ĉinaj kaj

fremdlandaj, antikvaj kaj modernaj, inkluzive tiujn de Ŝekspiro, Balzac kaj ĉinaj verkistoj Maŭ Dun kaj Bakin.

En 1979 la ĉinlingva fakultato de la Radio-televida Universitato de Tjanĝin akceptis novajn lernantojn. Informiĝinte pri tio Ĝeng Ĵongĉen, tornisto de metalaja fabriko, tuj iris al la lernejo kaj petis permeson lerni en ĝi. Tio embarasis la laborantojn, ĉar ili neniam akceptis blindajn lernantojn. Ĝeng Ĵongĉen diris: "Mi estas intelekta blindulo el kulturita de la ŝtato, mi devas labori por nia lando. Se mi ne plue altigos la kulturan nivelon, ĉio estos vana. Mi ne timas malfacilojn. Mi provu lerni." Korktuŝite de lia sincereco, la ĉeestantaj instruistoj post interkonsiliĝo konsentis esceptokaze akcepti lin kiel provlernanton.

Estas malfacile por blinduloj lerni en universitato. La unua malfacilaĵo, kiun li renkontis, estis lerno-materialoj. Aĉetinte lernolibron, li petis aliajn tralegi la tutan libron kaj registri la leĝon per diktafono, por ke li notu brajle poste. Tiam li laboris tage, prenis lecionojn vespere kaj enlitiĝis je la deka. Li ellitiĝis je 30 m. antaŭ la 2-a noktomeze, ordigis lecionajn notojn kaj lernis ĝis frumateno. Kaj estis tiel preskaŭ ĉiutage. Por aĉeti referencajn librojn li vivis ŝpareme. Li diris: "Se mi retiriĝos, oni ne

Ĝeng Ĵongĉen





Geng Jongcun en prelego

nur diros, ke Ĝeng Jongcun ne kapablas, sed ankaŭ rigardos ĉiujn blindulojn netaŭgaj por lerni en alta lernejo. Por fari pioniran aferon oni devas ĉion riski." En tri jaroj li faris kopiojn kaj notojn el ĉirkaŭ 7 000 000 brajlaĵoj. Sur la kampo de scioj, ju pli multe oni laboras, des pli riĉe oni rikoltas. Kvankam li maldikiĝis, tamen akiris rimarkindan progreson en lernado. En la ekzameno por fini la universitatan lernadon li akiris bonajn notojn en la ĉefaj lernobjektoj.

"La popolo donis al mi sciojn, kaj mi devas servi al la popolo." En 1982 li komencis prepari sin por verki pri la vivo de blinduloj. Por versimile kaj ĝuste pri-skribi la detalaĵojn, li konsultis reĝisoron pri sceneja dekoracio, belarta projekto kaj kostumoj de

aktoroj, pridemandis maljunulojn pri la moroj, kostumoj kaj urb-aspekto de la malnova Tjanĝin. Frumatene de iu tago li rapidis registri sin ĉe kuracejo pri oftalmologio. "Kio okazis al viaj okuloj?" demandis kuracistino. Svingante la manon, li diris: "Antaŭ 30 jaroj miaj okuloj blindiĝis. Ne kuracu mian okulmalsanon, ĉar ĝi estas nekuracebla. Mi volas verki ion pri blinduloj, kaj mi devas konsulti vin pri scioj de oftalmologio." "Ehe, mi komprenas." La kuracistino respondis liajn demandojn.

En la fino de 1982, li finis la unuan malneton de la romano "Amo al Bivo". Leginte ĝin, liaj instruistoj kaj amikoj prezentis multajn opiniojn por ĝin plibonigi. Ekde tiam li laboris super plibonigado, eĉ forgesante man-

ĝi kaj dormi. En la aŭtuno de 1983 li finis la plibonigon. Kiam veterana redaktisto de la Eldonejo Popola Literaturo, la plej granda eldonejo tiusfera de Ĉinio, atente tralegis la tutan manuskripton, li tuj veturis de Pekino al Tjanĝin por ellabori por li projekton por pluapasa polurado. Printempe de 1984, Ĝeng finis sian poluradon de la verko. Ĝi estos baldaŭ eldonita laŭ plano de la eldonejo. Ĝeng Jongcun estas akceptita kiel membro de la Ĉina Verkista Asocio.

Estas la unua fojo en Ĉinio, ke blindulo verkis romanon. Prave diris iu handikapulo: "La socialisma sistemo ne nur savis nin el suferoj, sed ankaŭ lumigis nian koron, tiel ke ankaŭ milionoj da blinduloj povas dediĉi siajn saĝojn kaj fortojn al la prosperiĝo de nia lando."

EPĈ 35-JARA!

En majo de la kuranta jaro, El Popola Ĉinio festos sian 35-jaran ekzistadon. Por tiu okazo, ni eldonos specialan numeron kun memorigaj artikoloj de en- kaj eksterlandaj amikoj, kiuj en la pasinteco helpis la kreskadon de la gazeto per verkado de artikoloj, alsendo de kuraĝigaj leteroj, fotoj, proponoj kaj kritikoj por plibonigi kaj plibeligi la gazeton, aŭ per varbado de abonantoj. Ni ankaŭ okazigos festokunvenon, dum kiu ni montros gratulajn telegramojn kaj leterojn, fotojn pri ekspozicioj, kunvenoj kaj kursoj,

en kiuj EPĈ estas montrataj, gazetojn kaj ĵurnalojn en kiuj aperis represitaj aŭ tradukitaj artikoloj el nia gazeto, por ke oni vidu kaj konvinkiĝu pri la praktika uzebleco de Esperanto. Ni petas, ke ĉiuj niaj geamikoj kaj kunlaborantoj ekagu tuj por sukcesigi la aranĝon, kiu alportos bonon ne nur al la gazeto, sed ankaŭ al la Esperanto-movado en nia lando. Antaŭan dankon por ĉiuj helpontoj al la aranĝo!

La redakcio de El Popola Ĉinio

Albumo pri ĈINIO

Kun pli ol cent koloraj bildoj konigantaj Ĉinion pri ĝiaj geografio, historio, popolo kaj registaro, ekonomio, literaturo kaj arto, sciencoj, edukado, higieno kaj sporto, vidindaj lokoj kaj socia vivo.

Eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Formato: 187 × 253mm. 96 pĝ.

Prezo: £ 1,90 US\$ 3,90

Numero: 85-Es-175P

**Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPĈ**

**aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de
Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta
Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**



Seninfana Maljunulino Prizorgata

Fotoj de ŠIN HŪA



Ke Šuĝjūan pasigas siajn maljunajn jarojn sub la prizorgado de la socio.



La 83-jara seninfana virino Ke Šuĝjūan en Jangpu-distrikto, Ŝanhajo, ricevas prizorgadon de multaj homoj, kiuj ne estas ŝiaj parencoj. Kiam ŝi estas malsana, ŝiaj najbaroj venas por flegi ŝin. En festotagoj al ŝi ne mankas vizitantoj. Ŝi vivas feliĉe en sia maljuneco.

Ke Šuĝjūan estas respektata de infanoj. Ŝi ofte rakontas al ili historiojn.

Oficistoj de la distrikta civila administracio gastas ĉe Ke Šuĝjūan.



Vendistoj ofte portas legomojn al Ke Šuĝjūan.



SOMERA TRAVIVAĴO

(Daŭrigo)

IV

Mi fine konsentis, ke Mej Ĉing akompanu Ŝaŝa hejmen, kiam mia trejnado finiĝos malfrue. Mi ofte staris sur la balkono por atendi, ĝis ili aperis ĉe la stratangulo.

Nun estis tempo por decidi, ĉu mi donu al ŝi mian pordŝlosilon. Ja serioza afero.

Jang Na vizitis min, kiel kutime, unu aŭ du fojojn semajne, sed ŝi ne renkontis Mej Ĉing. Tuj post kiam Mej Ĉing akompanis Ŝaŝa tra la ŝtuparo ĝis la pordo, ŝi foriris. Kiel knabino ŝi estis sinĝena, kvazaŭ plene sin dediĉanta al la laboro.

Iun pluvan tagon la trejna sekcio de la Sporta Komisiono diskutis la planon pri trejnado antaŭ partopreno en konkurso eksterlande. La diskuto daŭris ĝis malfrua tempo. Mi hastis hejmen. Apenaŭ mi surpaŝis la ŝtuparon, mi aŭdis, ke Mej Ĉing mallaŭte lernigas al Ŝaŝa kanton.

Malsekigite de la pluvo, ŝi sidis ĉe la pordo kun Ŝaŝa en la sino kaj faris taktojn per ŝia maneto. Ŝi rimarkis min, nur kiam mi venis antaŭ ilin.

Mej Ĉing tuj ekstaris kaj iom glatigis sian malsekan veston gluiĝintan al la korpo. Graseta, ŝi havis belan staturon, staturon de naĝistino.

“Ŝaŝa, via paĉjo revenis.”

Ŝasa ĵetis al mi straban rigardon, montrante koleron per la vizaĝo.

“Ni longe vin atendis kaj preskaŭ frostiĝis,” diris Mej Ĉing. Ŝia

riproĉeto estis malkaŝa, tamen sentigis agrablecon, kaj la atmosfero tuj malstreĉiĝis pro tio. Ŝi estis knabino ĝuste tia, kiu kvazaŭ ne scias malĝojon, sed plezu-



ras eĉ ĉe suferoj. Ŝiaj lipoj purpurriĝis de malvarmo.

Mi ekprenis Ŝaŝa en la brakojn. Ho, kiel malvarmaj estis ŝiaj manetoj!

Tiam la vorto, kiu longe hezitis sur mia lango, tuj eliris: "Mej Ĉing, mi donu al vi pordŝlosilon."

Ŝi ekridis: "Ĉu tio decas? Se perdiĝos via havaĵo, mi ne povos kompensi per mia mizera salajro."

Ŝi diris tion tre serioze. Tio iris el ŝia buŝo sincere, naive kaj plaĉe. Kun krio "Ĝis revido!" ŝi jam sin turnis kaj kuris malsupren, kvazaŭ timante, ke mi insistos, ke ŝi tuj decidu gravan aferon ankoraŭ ne bone pripensitan de ŝi. Ŝi certe antaŭsentis ion.

Aŭdiĝis klara paŝbruo — venis Jang Na.

Ŝi portis nigran pluvmantelon, sur kiu brilis akveroj. Ŝi aspektis

tre elegante, la vizaĝo estis pli blanka, la okuloj pli grandaj.

"Denove mi, ĉu bonvena al vi?" ŝi diris kun rideto.

Mi malfermis la pordon kaj diris: "Ankaŭ mi ĵus revenis."

"La malsuprenirinta estas vartistino de la infanĝardeno?" Ŝi demetis la ĉapon kaj skuis la kapon. Tuj defalis ŝiaj densaj kaj nigraj kapharoj kvazaŭ falakvo.

"Estas instruistino de infanĝardeno."

"Ĉu vartistino kaj instruistino ne estas egalaj?" ironie odoris ŝia parolo. Tamen ŝi mem estis laboristino de kranakva kompanio, kiel do ŝi rigardis sin mem? Mi koleriĝis, sed dum tia okazo mi ĉiam tenis mian buŝon fermita.

Mi ŝanĝis la vestojn por Ŝaŝa kaj viŝis ŝiajn harojn per mantuko. Post tio mi metis kuirpoton sur la fornon por prepari denove nudelon. Ĉion ĉi mi plenumis

silente. Ŝaŝa rigardis televidan programeron. Ŝajnis al mi, ke ankaŭ Jang Na iris rigardi. La nudelo prepariĝis. Mi demetis la poton. Mi turnis la kapon kaj vidis Jang Na apoganta sin sur la pordo de la kuirejo. Ŝi gracie klinis malantaŭen sian kapon, kaj ŝiaj grandaj okuloj plenis de larmoj.

"Mi ne plaĉas al vi ĉu?"

Tio estis nerespondebla. Ŝi estis kiel foto de filmaktorino sur kalendaro, kiun mi povas pendigi sur muro por rigardi, sed kun kiu nenian rilaton mi havas.

Ankaŭ la patrino de Ŝaŝa estis tre bela. Ŝia beleco kaŭzis al ŝi grandan maltrankvilon, ke ŝi ĉiam timis vanigi la favoron de la Ĉielo. Beleco fariĝis peza ŝarĝo por ŝi. Homo aspekte bela, tamen anime malplena, kiel elĉerpita puto. Estante kun ŝi, vi sentos trompiĝon.

"Vi tre bela. Vi certe havos



feliĉon,” mi konsolis Jang Na post momento.

“Ne. Mi estas malfeliĉulo, sed vi feliĉa.” Apogante sin sur la pordo kiel antaŭe, ŝi senmove fiksis rigardon sur mi.

V

Ĉiutage mi vidis Mej Ĉing dufoje. Matene ŝi venis preni Ŝaŝa kaj vespere akompanis ŝin hejmen.

Mi intence lasis ŝin tion fari. Mi provis ŝin foje-refoje, ĉar mi pli aĝis ol ŝi je dek kelkaj jaroj kaj ne ĉiam estis trankvila pri tio. Komprenoble la demandoj ĉiam falis sur Ŝaŝa. Ŝi lavis vestojn por Ŝaŝa — efektive mi havis lavmaŝinon, ŝi flikis ŝtrumpetojn por ŝi — efektive mi povis aĉeti novajn por ŝi. Ŝi lavis al ŝi la kapon, kombis al ŝi la harojn, tondis al ŝi la ungojn kaj faris por ŝi antaŭtukon. En la infanĝardeno okazis aktivado “Ami infanojn kiel patrino”. Ŝi multe superis la patrino de Ŝaŝa. Nun ŝi ĉiam kaj ĉie agis kiel bona patrino de infanoj.

Foje ŝi diris: “En mia familio estas tri membroj: panjo, mi kaj mia frato.” Kion tio signifas?

Alifoje ŝi diris: “Kiel kompatinda estas Ŝaŝa sen la panjo!” Kion tio aludas?

Iun dimanĉon mi hazarde renkontis ŝin kaj trovis, ke ŝi loĝas ne proksime, ĉ. unu kilometron for de mia hejmo. Sed ŝi kaŝas tion antaŭ mi kaj ĉiam ŝajnis sin mia najbaro. Ŝi tiel volonte servis al mi, mi bone komprenis ŝian koron!

Mi demandis ŝin: “Ĉu la infanoj ne ĝenas vin?” “Kial ne,” ŝi diris. “Iafoje mi eĉ volis pinĉi ilin. Kiam mi revenis hejmen, iliaj kriado kaj plorado ankoraŭ pikis miajn orelojn. Mi volis trovi kvieton eĉ momentan. Mi alku-

timiĝos al tio iom poste.” Sed kial ŝi traktis Ŝaŝa tiel bone?

Ĉio estis tre klara, kaj respondo nur unu.

En la unua duonmonato de septembro nia korbopilka teamo konkursos eksterlande. Mi ĝojis havi la tempon por decidi la aferon.

Estis la 2-a de aŭgusto. Mi staris sur la balkono por atendi ŝin. Ŝi venis en blanka ĉemizo kun duonronda kolumo, verda jupo kaj helflavaj altkalkanumaj ŝuoj. Tirante Ŝaŝa je la mano, ŝi atentis preterveturantajn aŭtojn kaj transkuris la straton. Ŝi emis ridi kaj kuri, ŝi ridis plaĉe kaj ankaŭ kuris bele. Mi taksis, ke post tri minutoj eksonos la pordofrapo. Mi atendis post la pordo. Apenaŭ mi aŭdis ŝian frapon, mi malfermis la pordon.

Ŝi surpriziĝis kaj diris kun rideto: “Vi timigis min. Ĉu vi vidis min?”

“Mi sentis. Bonvolu eniri!”

Ŝi iom hezitis. Antaŭe, anstataŭ enpaŝi ŝi ĉiam kriis haste: “Mi foriras. Ĝis revido, Ŝaŝa!” Ĉi-foje ŝi envenis kaj demandis: “Ĉu mi helpu vin?”

Mi tamen demandis: “Ĉu vi naĝis hodiaŭ?”

“Jes, mi naĝas ĉiutage. Vidu, kiel sunbruna mi estas!”

“Ĉu vintre?”

“Tiam mi sketas.”


Ŝi certe sketis bone.

“Ĉu arte aŭ rapide?”

“Rapida sketado pli plezurigas. Kiu plej rapide sketas, tiun mi penas kuratingi.”

Ŝi estis facile alirebla kaj parolis ĉiam vigle. Mi devis tuŝi mian gravan temon.

“Post tri tagoj mi forflugos eksterlanden kun la korbopilka



teamo por konkurso. Mi petas vin prizorgi Ŝaŝa duonmonaton dum mia foresto, ĉu bone?” Mi atente rigardis ŝin kaj observis ŝian vizaĝon.

“Ŝaŝa, ĉu vi konsentas?” ŝi demandis Ŝaŝa, preninte ŝin en la brakojn, kvazaŭ ŝi tute neglektus min. Mi iom malesperiĝis.

“Paĉjo jam antaŭlonge diris tion al mi. Paĉjo, vi tion diris hieraŭ vespere, ĉu ne?”

Mi diris tion vespere antaŭ tri tagoj. Ne. Dum tiuj tri tagoj mi diris al Ŝaŝa foje kaj refoje: “Paĉjo forveturos eksterlanden, vi restu kun instruistino Mej.” Mi ne sciis, kiom da fojoj tion mi ripetis.

“Nu, bone, Ŝaŝa estas tre amika al mi kaj plej bone aŭskultas min.” Ŝi daŭre ŝajnis sin parolanta kun Ŝaŝa. Kia spirito!

Mi prenis el tirkesto ŝlosilon kaj donis ĝin al ŝi: “Tiu por vi.”

“Ĉu mi loĝu ĉi tie?” ŝi iom surpriziĝis.

“Mi konfidu al vi ankaŭ mian hejmon,” mi diris kun rideto kaj denove rigardis ŝin.

“Ĉu mi rajtas disponi vian televidilon?” ŝi demandis naive kaj sincere.

“Komprenoble,” mi respondis. Mi volis diri alian pli gravan, pli signifoplenan vorton, sed tion mi ne faris.

VI

Mi revenis de la konkurso kaj atingis la hejmon je la kvara posttagmeze.

Ĉio tie ĉi vidigis ŝian laboron: La ĉambroj puraj kaj bonordaj, la kapkuseno tegita per blanka gaza tuko, botelo da mandarina suko kaj tri pure lavitaj rafanoj en la fridujo, du malgrandaj seĝoj sur la balkono.

Jang Na certe iam venis. Supezeble ŝi forte surpriziĝis, ekvidinte Mej Ĉing hejme.

Ĉu iri nun al la infanĝardeno aŭ atendi hejme? Atendi hejme estigos eksterordinaran efikon. Tamen mi devis suferi de tri-hora atendado!

Atendi, estas bone atendi. Estas malfacile dum la vivo havi kelkajn belajn momentojn. Ĉe la unua renkontiĝo eldiri la plej gravan vorton, kiu signos komencon de la nova vivo.

Dum la tri horoj mi sidis sur la balkono. Mi estis certa, ke ŝi ne aperas ĉi-momente, tamen mi de tempo al tempo ĵetis rigardon al la loko trapasita de ŝi ĉiutage. Estis plezure por mi memori eksterlande tiun stratangulon.

Je duono post la sepa ŝi kaj Ŝaŝa aperis ĉe la semaforo. Ili fine venis. Ŝi certe rimarkis la lumon en miaj ĉambroj. Mi ŝaltis ĉiujn pend-, tablo-, mur- kaj star-lampojn en la apartamento por bonvenigi ŝin. Tio estis ankaŭ montrado de mia gaja humoro. Ŝi tiris Ŝaŝa je la mano kaj atendis forpason de aŭtoj. Eble pro malpacienco ŝi ekprenis Ŝaŝa en la brakojn kaj alkuris.

Mia koro forte batadis. Ankaŭ brakhorloĝo tiktakis en mia poŝo. Ĝi estis virina brakhorloĝo de marko Radaro "eleganta kaj plenkla de pompeco de moderna virino", kian oni reklamas en televida afiŝo. Foje, kiam ŝi rigar-

dis tiun afiŝon, ŝi pretervole ekkriis: "Belega!"

Tio estis donaco, kiun mi aĉetis eksterlande speciale por ŝi. Mi malsupreniris la ŝtuparon, sed poste returnis min denove supren. Pli decas atendi ŝin ĉe la pordo. Ili venis. "Paĉjo, paĉjo!" kriis plengorĝe Ŝaŝa kun brakoj ĉirkaŭ mia kolo.

Ankaŭ Mej Ĉing tre ĝojis kaj diris: "Tre bone, vi revenis! Jam de malproksime ni vidis la lumon. Hieraŭ vespere mi vetis kun Ŝaŝa pri tio."

Ŝia ĝojo estis elkora, ne ŝajniga. Mi kredis miajn okulojn. Ŝi des pli plaĉis al mi. Efektive ŝi estis tre bela. Ŝia granda buŝo bone harmoniis kun ŝia serena kaj vigla karaktero. Bele ridas nur tiu, kiu havas grandan buŝon. Ankaŭ ŝiaj okuloj havis taŭgan grandecon, nur tiaj estis mildaj, afablaj kaj sinceraj.

Ĉiuj formalaj demandoj pri la konkurso, spertaĵo en la fremda lando kaj sanstato estis tuŝitaj. Ŝi montris grandan intereson por tio. La brakhorloĝo Radaro tiktakis en mia poŝo. Ne. La vorton kaŝitan en la koro mi diros, kiam mi kvietiĝos kaj liberiĝos de ĉiuj ĝenoj.

Mej Ĉing ekrigardis la vekhorloĝon kaj kriis: "Aĥ, tiel malfrue! Ĉu vi iros al laboro morgaŭ?"

"Ne. Ni havas dutagan ferion."

"Bonege!" ŝi brue kuretis en ĉambron, ekprenis siajn vestojn ĉe la litkapo kaj revenis. "Ŝaŝa, ne forgesu lavi viajn piedojn!"

Mi tuj diros la gravan vorton, ke mi amas ŝin. Kian reagon ŝi havos?

"Ĉu vi hejmeniras nun?" mi demandis per kvieta tono.

"Aĥ, mi preskaŭ forgesis!" ŝi ekridis.

Ŝi elpoŝigis la ŝlosilon kaj redonis ĝin al mi: "Morgaŭ Ŝaŝa ne iros al la infanĝardeno kaj ankaŭ mi riceviŝ forpermeson . . . Mi edziniĝos postmorgaŭ."

Mi tute stuporiĝis. Neniam esprimon mi povis fari. Mi nur stulte rigardadis ŝin.

"Vi iam vidis lin." ŝi certe trovis mian mienon ridinda.

"Kiu . . . li estas?" raŭkiĝis mia voĉo.

"Dufoje vi vidis lin surstrate. Lasu min iom pensi. Jes, trifoje. Foje ni iris al kinejo kaj dumvoje renkontis vin, kaj li donis bombonon al Ŝaŝa . . ."

Kia mia memoro! Neniam tia knabego, kiu kuniris kun ŝi, vekis mian atenton!

Ŝi foriris. La ŝlosilo estis lasita sur la tablo. Nur tiam mi trovis, ke la brakhorloĝo jam estis elpoŝigita, sed kiam, mi ne scias, kaj firme premita en mia mano.

Mi eliris sur la balkonon kaj per la okuloj akompanis ŝin transiri la straton, ĝis ŝi malaperis en homamaso. Mi neniam dankis ŝin kaj rigardis ĉion natura. Nur nun mi komprenis, mi hontis, mia vizaĝo brulis.

La ĉielo plenkla de steloj, sur la strato brilis diversaj lampoj kaj en la aero ŝvebis ebriga odoro de somero.

Pasis la somero, sekvis aŭtuno, vintro, venis denove printempo . . .

Kiel kutime Mej Ĉing venis dufoje ĉiutage. Matene ŝi frapis al la pordo: "Ŝaŝa, rapidu, alie ni malfruiĝos!" Vespeze ŝi akompanis ŝin hejmen kaj ripetis la samon: "Mi foriras! Ĝis revido, Ŝaŝa!"

La dankvorton mi ankoraŭ ne eldiris. Mi timis pro tio profani ion plej karan en la mondo . . .

Solvinto de la "enigma de blindiĝo de la napoleonaj soldatoj"

de LI ĈUNŜENG

LA batalo ĉe Vaterlo vaporigis la revon de Napoleono konkeri la mondon. En la jaro 1801, li fuĝis el Egiptujo en Parizon kun la celo restaŭri. Sed, en liaj t.n. ĉiamvenkaj feraj kruckavaliroj la soldatoj aro post aro suferis de okulmalsano. Komence la okuloj ruĝiĝis kaj larmis senĉese, sekve la okulharoj ekinversiĝis frotante la korneojn, poste la okulgloboj kovriĝis de tavolo da konjunktivo kaj fine perdiĝis la vidkapabló.

Tiutempe neniu povis konkrete diri kiel nomiĝas la okulmalsano. Je koleriĝo Napoleono mortigis armeajn kuracistojn. Jen tiel disvastiĝis la famo pri "enigma de la blindiĝo de napoleonaj soldatoj".

Tian okul-malsanon la eŭropanoj siatempe nomis "egipta okulmalsano", fakte ĝi estas trakomo.

Tiam 90% el la tuta loĝantaro de Egiptujo suferis de trakomo, kaj en la malnova Ĉinio trakomo-suferantoj konsistigis 50% de la loĝantoj. Trakomo fariĝis katastrofo ĉie en la vasta mondo.

Pasis cent jaroj, tamen trakomo restis ankoraŭ enigmo por la mondaj medicinaj rondoj. En la jaro 1907, en Javo, ĉeĥa erudito trovis el konjunktivo de trakomo-suferantoj grajnet-forman objekton multe pli malgrandan ol bakterio kaj generantan en ĉeloj. Li opiniis, ke ĝi estas viruso de trakomo. Sed, por fari trakoman eksperimenton necesas apartigi la viruson, inokuli la viruson al animalo kaj homo. En 1928, japano Noguĉi sukcesis apartigi bakterion el trakomo. Li opiniis, ke ĝi kaŭzas trakomon kaj nomis ĝin "trakoma bacilo". En 1930, ĉina sciencisto faris eksperimen-

tadon kaj pruvis, ke la tiel nomata "trakoma bacilo" ne povas kaŭzi trakomon, kaj neis la teorion de Noguĉi.

Kiam la medicina rondo falis en dilemon rilate al trakomo, ĉinaj fakuloj persistis en sia eksperimentado. Ili provis apartigi trakoman viruson sinsekve el la okuloj de ok simioj kaj 2 500 kobajoj, bedaŭrinde malsukcesis ĉiuj provoj. Ili tamen konstatis, ke oni povas inokuli la trakoman viruson al la konjunktivo de simioj, sed ne povas ĝin apartigi. En 1955, profesoro Tang Fejfan, membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj direktoro de la Pekina Instituto de Biologiaj Produktoj, kune kun siaj kolegoj alprenis novan eksperimentan teknikon. Post kelkcent provoj kaj eksperimentoj, ili finfine akiris la unuan "viruson" de trakomo en la mondo per inokulado al embria ovoflavo kaj streptomicina inhibicio. Profesoro Tang la unua inokulis tian "viruson" al siaj propraj okuloj kaj ricevis kontentigan rezulton. Li komencis kuracadon de siaj ruĝ-ŝvelintaj okuloj nur post pli-ol-kvardektaga observado. En 1956 profesoro Tang per sia disertacio mirigis la medicinajn rondojn de la mondo. Oni nomis tian viruson "Tang-viruso".

Tiel finfine solviĝis la enigmo nekomprenebla por Napoleono antaŭ cent jaroj kaj problemo en la medicina historio dum duona jarcento. En la 12-a de majo, 1981, pli ol dudek jarojn post la forpaso de profesoro Tang Fejfan, la internacia trakom-preventiva organizo solene proklamis en Parizo premii al Tang Fejfan oran medalon. Kaj tiel la nomo de ĉina profesoro Tang Fejfan kaj lia kontribuo skribiĝis en la historian kronikon de la mondo.





Ekologio en peklujo

de SING MIN

Multaj familioj en Ĉinio havas vazon por pekli legomojn. Ĝi estas ceramikaĵo kun granda ventro, malgranda buŝo kaj aparta akvotrogo ĉe la rando. La bovla kovrilo bone kovras la buŝon. Ĝi similas al hermetike fermita aŭtomata legom-prilaborejo. Freŝaj krudaj legomoj enmetitaj en la vazon kun salakvo, post kelkaj tagoj, maksimume post duonmonato, fariĝas peklita manĝaĵo aroma, fragila, delikata kaj bongusta kun konvena saleco kaj acideco.

Ĝiaj krudaj materialoj plejparte estas sukoplenaj legomoj. Kvankam lavitaj, ili neeviteble kunportas tiajn aŭ aliajn mikrobojn, inter kiuj troviĝas ŝimigaj kaj putrigaj bakterioj. Krome estas kojraj, disenteriaj baciloj, salmoneloj k.a., kiuj kaŭzas malsanojn al homoj. . . Sed, la ekzamenon montris, ke post prilaborado en la peklujo tiuj malutilaj mikroboj komplete malaperis.

Kiel tio okazis? Ĉar en la peklujo estas speciala ekologia me-


dio kaj la malutilaj mikroboj estas ekstermitaj post la batalado inter diversaj mikrobo-grupoj.

Kiam la peklujo pleniĝas de freŝaj legomoj kaj kovriĝas de la bovlo kaj la akvo en la trogo, la aero ne povas penetri en la ujon. Komence diversaj mikroboj, kiuj venis en la ujon kune kun la enmetitaj legomoj, vivas kaj generas same kiel antaŭe laŭ respektivaj kutimoj. Sed, ne longe poste, tiuj mikroboj, kiaj la ŝimigaj, kiuj bezonas oksigenon por la vivo, eksentas danĝeron de la situacio. En la peklujo estas ne multe da aero, kies oksigeno baldaŭ foruziĝas, dume pliiĝas karbona dioksido, kiu plenforte elpremas la restintan aeron. Kiam tute malaperas oksigeno, venas do la fino de la malutilaj mikroboj.

Manko de oksigeno estas favora al la anaerobiaj bakterioj. Tial la gento de kojlobacilo longan momenton prosperiĝas. Pro ĝia aktivado la sala akvo acidiĝas, kaj la acida medio reakcie

malvigligas ĝin. Tiam la utila acid-imuna mikrob-gento — laktacida bakterio paŝo-post-paŝe montras sian vivforton kaj okupas la superecon en la batalo por ekzisto. Ĝi estas speciala produktanto de laktacido kaj daŭrigas la acidigon de la sala akvo. Kiam la denseco de laktacido atingis ok milionojn, ĉiuj malutilaj mikroboj, kiuj havas malfortan rezistemon kontraŭ acido, mortas unu post alia. De tiam la laktacida bakterio regas en la vazo de peklitaj legomoj.

En tiu procezo mikroboj produktas bongustan aminacidon kaj aromajn kombinaĵojn, kaj la acida kaj oksigeno-manka medio garantias la plenan konservon de vitamino C. Ĉio ĉi ebligas al la peklitaj legomoj esti nutroriĉaj, sanigaj kaj bongustaj kaj multe altigas la nutran valoron de legomoj.



MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

LHASA, ANTIKVA URBO SUR ALTEBENAĴO

de ŬANG ŜJANGKUN

LHASA — la ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono estas antikva urbo kun historio de pli ol 1 300 jaroj. Ĝi staras norde de la meza parto de Lhasarivero, branĉo de Jarlunzangbrivero, kun alteco de 3 650 metroj super la marnivelo kaj jara sunbrila daŭro de 3 005.7 horoj

meznombre, kaj tial estas nomata “Alta Urbo de la Mondo” kaj “Suna Urbo”. Sciencistoj konstatis, ke ĝi estas ankaŭ unu el la raraj urboj en la mondo kun plej pura aero.


Antaŭ la 7-a jarcento tie troviĝis nur sovaĝa marĉejo nomata Ŭomatang, kiu servis al Supi-tri-

bo kiel paŝtejo. Post kiam Tubodinastio de Tibeto subigis Supi-tribon, la talenta kaj brava Sunzamkampo transigis sian ĉefurbon tien en la jaro 633 kaj unuigis Tibeton.

En la unuaj jaroj la ĉefurbo estis mizere simpla. Kiam Sunzamkampo edzinigis la principon

Sela, unu el la tri grandaj temploj en Lhasa

Foto de LIŬ TJEŜENG





Rikolto de kukumo en forcejo

Foto de TU DENG

Ŭenĉeng de Tang-dinastio al si en 641, tie eĉ ne troviĝis halo por kulti la budhan statuon alportitan de la princino, kaj oni povis loki ĝin nur en tendo en arbaro. La alveno de la princino Ŭenĉeng multe progresigis la konstruadon de Lhasa. En 647 la princino persone elektis terenon por konstruigi la faman templon Zulakang, la unuan grandan konstruaĵon en la historio de Lhasa. Poste ĉirkaŭ la templo stariĝis sinsekve gastejoj, butikoj, metiejoj kaj loĝdomoj, kaj aperis la rudimento de Baĝjaŭ-strato. De la strato radie disetendiĝis ok stratetoj, kaj formiĝis la baza strukturo de la antikva Lhasa. En la komenco de la 9-a jarcento, la loko prosperiĝis kaj ricevis la nomon Lhasa, kiu en la tibeta lingvo signifas "lokon de budhoj".

Zulakang-templo, kiu staras en la centro de la malnova kvartalo de Lhasa, komence havis nur unu grandan halon. Poste ĝi estis

plurfoje riparita kaj plivastigita kaj nun kovras areon de 25 000 kvadrataj metroj. En tiu tibetstila ligno-ŝtona monaĥejo ĉiuj domoj ĉirkaŭas kvadratajn kortojn. Ĝiaj fruaj konstruaĵoj kun ligna trabaro, kapituloj kaj kolordesegna plafono aplikis arkitekturon de Tang-dinastio. La 4-etaĝa ĉefa halo kun 4 oritaj tegmentoj kaj firstoj dekoraciitaj per oritaj sutroradoj, budhismaj flagoj kaj aliaj ornamaĵoj aspektas aparte impona kaj grandioza, brilante sub la suno.

En la centra halo de la unua etaĝo konserviĝas la sida statuoj de la 12-jara Ŝakjamunio, kiun la princino Ŭenĉeng alportis de Ĉang'an (la nuna Ŝĵian). Bonodoraj incensoj fumadas antaŭ la statuoj. En okcidenta ĉambro de la dua etaĝo troviĝas statuoj de Sunzamkampo, la princino Ŭenĉeng kaj la nepala princino Ĉizun. La montra fingro de la maldekstra mano de Sunzamkampo surhavas ringon inkrustitan per turkiso, kiun, laŭlegende, la princino Ŭenĉeng donacis al li kiel geedziĝan memoraĵon.

Antaŭ la templo estas tereno de 20 kvadrataj metroj ĉirkaŭita per ŝtona balustrado. Tie kreskis maljuna saliko, kiun, laŭdire, Sunzamkampo kaj la princino Ŭenĉeng persone plantis, post kiam la templo konstruiĝis. Tibetaj popolanoj nomis la arbon "Saliko Tang" aŭ "Saliko Princino". Bedaŭrinde, antaŭ dek jaroj velkis la miljara arbo. Por memori la principon Ŭenĉeng, lokanoj plantis apude junan salikon, kiu nun montras plenan vivecon kaj simbolas la longedaŭran amikecon inter la tibetaj kaj han-aj popolanoj. Norde de la saliko troviĝas steleo starigita de la imperiestro Muzong de Tang-dinastio en 823, kun epigrafo pri la fakto, ke la principinoj Ŭenĉeng

kaj Ĝinĉeng edziniĝis al la reĝoj de Tubo-dinastio kaj per tio stariĝis parenca rilato inter la du dinastioj. La epigrafo travivis miljaran erodadon de la naturo kaj restas legebla. Ĝi estas ne nur historia atesto pri la amikeco inter tibetanoj kaj han-oj, sed ankaŭ grava antikva dokumento de Tibeto.

La mondfama Potala-palaco impone staras sur la monto Potala, je ĉirkaŭ 1 kilometro nordokcidente de Zulakang-templo. La palaco frontas suden kaj alte leviĝas unu etaĝo super alia laŭ la deklivo de la monto. Ĝi altas je 117.19 metroj, longas je pli ol 360 metroj de oriento al okcidento kaj larĝas je ĉirkaŭ 100 metroj de sudo al nordo. Ĝia ĉefa domo, rigardate de ekstere, havas 13 etaĝojn, sed fakte 9 etaĝojn. La tuta konstruaĵo estas de ligno-ŝtona strukturo kaj konsistas el du partoj: la ruĝa palaco en la mezo kaj la blanka palaco ĉe ambaŭ flankoj. Sur la supro de la palaco elstaras 6 brilantaj oraj tegmentoj diferencaj unu de alia. En distanco de kelkdek kilometroj oni jam povas vidi la majestecon kaj grandiozecon de tiu antikva arkitekturaĵo.

Potala-palaco komencis konstruiĝi en la unuaj jaroj de la 7-a jarcento, sed escepte de du budhaj haloj, ĝiaj fruaj konstruaĵoj plejparte detruigis en militoj kaj naturaj katastrofoj. La nuna palaco estis rekonstruigita de Dalaj-lamao la Kvina en la 17-a jarcento. La rekonstruado daŭris ĉirkaŭ 50 jarojn. La konstruaĵo estis la rega centro de la unuigita lamaismo kaj registaro de la malnova Tibeto kaj ankaŭ la vintra palaco de Dalaj-lamaoj de diversaj generacioj.

Potala-palaco, kun 1 000 haloj kaj ĉambroj, kovras areon de

130 000 kvadrataj metroj. En ĝi konserviĝas multe da valoraj historiaj restaĵoj. La murojn de ĝiaj haloj kaj ĉambroj kovras vivecaj, brilkoloraj kaj delikataj freskoj kun interesaj enhavoj. Ili enkorpigas la artan talenton de tibetanoj. Iuj el ili priskribas la konstruadon kaj riparadon de la palaco. La freskoj estas valoraj materialoj por esplori la historion de Potala-palaco kaj la socian staton de la antikva Tibeto. Historiaj notoj diras, ke dum la konstruado de la palaco, 66 famaj pentristoj laboris pli ol dek jarojn super tiuj freskoj.

Parto de la konstruaĵo en la grandioza palaco servis al Dalaj-lamaoj de diversaj generacioj kiel rezidejo kaj loko por politikaj aktivadoj. La Orienta Halo, konstruita en 1645, estas la plej granda halo en la blanka palaco. En ĝi, depost Dalaj-lamao la Kvina, okazadis solenaj ceremonioj, kiam Dalaj-lamao heredis la titolon aŭ transprenis regpotencon, kaj aliaj gravaj aktivadoj politikaj kaj religiaj.

La relikvostupaaj haloj kaj sutro-recitaj haloj estas la ĉefaj konstruaĵoj en la ruĝa palaco. En Potala-palaco troviĝas 8 relikvostupaaj haloj skale malsamaj, sed stile similaj, kun luksaj oraj stupaoj interne kaj oraj tegmentoj supre. La relikvostupaa halo por Dalaj-lamao la Kvina, konstruita en 1690, estas la unua kaj la plej granda en Potala-palaco. La halo konsistas el tri etaĝoj, kaj la stupao, 14.85 metrojn alta, el soklo, korpo kaj supra. En la stupao estas entenata la relikvo de Dalaj-lamao la Kvina. La stupao estas tegita per oro kaj inkrustita per perloj kaj gemoj. Por ĝin fari oni uzis 3 718 kilogramojn da bonkvalita oro kaj 18 677 perlojn kaj gemojn. Krome, sennombraj juveloj estas kon-



Lamaoj bonvenigantaj gastojn

Foto de ĈENG ŜJI

servataj en la stupao. La relikvostupaa halo por Dalaj-lamao la Dektria, konstruita en 1936, estas malpli granda, sed pli luksa kaj impona. La stupao en ĝi, inkrustita per pli ol 200 000 perloj kaj gemoj, estas unu el la brilaj trezoroj en Potala-palaco.

La temploj Gandan, Ĝebung kaj Sela estas tri famaj monaĥejoj en Lhasa, starigitaj de Congkapa, la fondinto de la flava sekto de lamaismo, kaj liaj disĉiploj. La tri temploj kun haloj kaj pavilonoj unu super alia konstruiĝis laŭ monto-deklivoj. Krom la

La Tibeta Instruista Instituto

Foto de TU DENG



templo Gandan, kiu estas riparata, la aliaj du temploj, bone konservataj, funkcias normale kaj estas senĉese vizitataj de pilgrimantoj.

En Lhasa troviĝas ankaŭ kelkaj pitoreskaj parkoj. La ĝardeno Norbu, je 1 kilometro sudokcidente de Potala-palaco, kun areo de 360 000 kvadrataj metroj, komencis konstruiĝi en la 40-aj jaroj de la 18-a jarcento. Ĝi estas konata ankaŭ kiel "Somera Palaco", kie Dalaj-lamao la Sepa kaj la postaj traktis registarajn aferojn, okazigis celebradojn kaj kondukis religiajn aktivadojn. La "Nova Palaco", konstruita en 1956, estis la loko, kie Dalaj-lamao la Dekkvara plenumis politikajn kaj religiajn aktivadojn. Nun ĉiuj objektoj en la palaco restas bone protektitaj kaj aranĝitaj kiel antaŭe, kaj la palaco jam fariĝis turisma vidindejo.

La laboremaj kaj saĝaj tibetanoj sur "la firsto de la mondo" kreis brilan antikvan kulturon, kiu estas honoro kaj fiero de la ĉina popolo. Tamen, en la longa daŭro de pli ol 1 300 jaroj Lhasa progresis tre malrapide. Ĝis la paca liberigo de Tibeto en 1951, en Lhasa apenaŭ troviĝis ia ajn urba instalaĵo, krom Potala-palaco, kelkaj famaj temploj kaj loĝdomoj de grandaj aristokratoj kaj grandaj komercistoj. En la tiama urbo, kun areo de 3 kvadrataj kilometroj kaj 30 000 loĝantoj, ne estis elektro, nek kranakvo, nek kloako. La mizeraj stratoj estis aŭ polvoplenaj aŭ kotaj laŭ la ŝanĝiĝo de vetero. Krom malgrandaj metiejoj de krudaj lanteksaĵoj, tibetaj incensoj kaj religiaj objektoj, en la tuta urbo ekzistis nenia moderna industrio. Surstrate tie kaj tie vidigis ĉifonaj tendoj loĝataj de malriĉuloj, kaj la nombro de va-

gantaj almozuloj iafoje atingis 6 000-7 000.

En la pli ol 30 jaroj, post kiam la kvinstela ruĝa flago unuafoje hisigis en Lhasa, la ŝtato sendis al Tibeto milojn da han-aj kadroj, inĝenieroj, teknikistoj, laboristoj kaj armeanoj por konstrui novan Lhasa kune kun tibetaj popolanoj.

Nun la urbo Lhasa kovras areon de 25 kvadrataj kilometroj kaj havas 110 000 loĝantojn. La areo de diversaj konstruaĵoj starigitaj post la paca liberigo estas dekoblo de tiu de la malnova kvartalo. Sur dezertaj riverbordoj kaj marĉejoj aperis nombro da fabrikoj, lernejoj, butikoj, hospitaloj, librovendejoj, poŝtoŝtancoj, teatroj, sportejo kaj movplenaj stratoj. La nove konstruitaj stratoj en la urbo, kun totala longeco de 57 kilometroj, estas larĝaj kaj ombrataj de arboj.

Reformitaj kaj asfaltitaj estas ankaŭ la ĉefaj stratoj en la malnova kvartalo ĉirkaŭ Zulakang-templo. Tie oni instalas stratajn lampojn, akvo-provizajn tubojn, kloakojn kaj grupon da komercaj kaj kulturaj establaĵoj. Ekde 1979, ĉirkaŭ Baĝjaŭ-strato, oni konstruis tibet-stilajn loĝdomojn kun plankareo de 63 000 kvadrataj metroj, kaj pli ol 700 familioj transloĝiĝis en novajn domojn.


Nun rekonstruado okazas sur tereno de ĉirkaŭ 10 000 kvadrataj metroj inter la malnova kaj nova kvartaloj. Laŭ la plano, oni konstruos tie religian placon por Zulakang-templo, je 40 metroj longan kaj je 60 metroj larĝan, kruciĝejan parkon kaj avenuon 170 metrojn longan kaj 40 metrojn larĝan. Ambaŭflanke de la placo harmonie aranĝitaj estos tibet-stilaj konstruaĵoj. Post la

konstruado la loko fariĝos ne nur nova komerca centro, sed ankaŭ grava tereno por religiaj aktivadoj, turisma vizitado kaj amuziĝado.

Hodiaŭ la antikva, sed juna urbo Lhasa jam malfermis sian pordon al la mondo. De 1979 ĝis 1983 ĝi akceptis pli ol 6 000 fremdlandajn vizitantojn, 6-oble de la nombro de tiuj en la daŭro de la paca liberigo de Tibeto ĝis 1978.


En la pasintaj pli ol 30 jaroj la urbo rimarkinde ŝanĝiĝis, sed ĉio ĉi estis nur la komenco de la ŝanĝiĝo de Lhasa. Aprile de 1983, la Ŝtata Konsilantaro sankciis la ĝeneralan planon pri la urba konstruado de Lhasa, kiu difinis, ke oni konstruu Lhasa en puran, prosperan socialisman urbon de nacieca solidareco kaj alta civilizacio, kun karakterizaĵoj de fama historia kaj kultura urbo. Printempe de 1984 la sekretariato de la Centra Komitato de la Partio okazigis kunsidon pri la tibeta laboro, formulis planon pri konstruado de Lhasa kaj decidis, ke 9 provincoj kaj municipoj helpu Tibeton en ĝia konstruado.


Nun 19 el la ĉefaj konstruoj de Tibeto okazas en Lhasa. Tiuj konstruoj estas senprecedence multaj kaj grandskalaj en la konstrua historio de la urbo. Popolanoj de Lhasa, kune kun 5 000 konstruantoj el la provincoj Ĝjangsu, Ĝeĝjang, Fuĝjan, Siĉŭan, la municipo Tjanĝin k.a., diligente laboras sur ĝiaj konstruejoj. La pli ol 20 ĉefaj konstruoj, farataj de Tibeto mem aŭ sub la helpo de aliaj provincoj kaj municipoj, plejparte plenumiĝos antaŭ aŭgusto de la kuranta jaro por bonvenigi la 20-an datrevenon de la fondiĝo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono en septembro. Tiam Lhasa aperos en tute nova aspekto.



Lhasa Foto de ŠEN JANTAJ

Potala-palaco Foto de ĆENG ŠJI





Novaj konstruaĵoj en Lhasa

Foto de ĈENG ŜJI

Laborejo de maŝin-riparejo de Lhasa


Foto de ĈENG ŜJI





Statuo de Ŝakjamunio., alportita de princino Ŭenĉeng en Tibeton

Foto de **ŜEN JANTAJ**



La antikva strato Baĝaŭ

Foto de **ŜEN JANTAJ**

Pikniko en la parko Norbu

Foto de **TU DENG**




Fazanadoj en Ĉinio

de ĈEN ŜJAŬJI



Fazano

Foto de ĈEN ŜJAŬJI



Ruĝventra kornofazano

Foto de ĜANG CIZU



Tibeta ruĝven-
tra kornofazano

Foto de ĜANG CIZU

EN la mondo ekzistas pli ol 270 specioj de galinofarmaj fazanedoj. La teritorio de Ĉinio estas vasta, topografio kompleksa kaj ekologia medio varia, kio taŭgas por la vivado de malmigrimaj fazanedoj. Tial en Ĉinio troviĝas 56 specioj de fazanedoj, kvinone kiom tiuj en la mondo, kaj el ili 19 specioj estas propraj al Ĉinio.

Fazanedoj estas multspeciaj, kun malsamaj formoj kaj diferencaj kutimoj. Tetraoj (*Tetrastes sewerzowi*) en grandeco de kolombo estas tre belaj. Tiaj birdoj estas malfacile akireblaj por apreco. Ili vivas en arbetoj sur alta montaro 3 200-3 800 metrojn super la marnivelo en Gansu, Ĉinghaj kaj Siĉuan en okcidenta Ĉinio. Al ili plej plaĉas rododendro. Ili sin vivtenas per semoj de plantoj kaj vermoj sur montaro. Sed tute aliaj ol ili, estas bambusikoloj (*Bambusicola thoracica*), kiuj ŝatas vivi

kolektive sur montaro kaj ebenaĵo je malpli ol 2 000 metroj super la marnivelo. Ilia tereno estas arbetaro, bambuaro kaj herboriĉa loko.


El tiom da fazanedaj specioj la plej rimarkindaj estas kornofazanoj. La masklaj havas super siaj okuloj po unu kornoforman elstaradon el karno, apenaŭ videblan. Nur kiam ili serĉas la femalajn por pariĝo, ilia elstarado grandigas, etendiĝas malantaŭen kaj fariĝas karna pinto.

La kornofazanoj konsistas el kvin specioj: la nigrakapa, ruĝbrusta, grizventra, ruĝventra kaj flavventra. La flavventra sin trovas nur en Fuĝjan, Gŭangdong, Gŭangŝji kaj Hunan de Ĉinio, kaj pro tio ĝi estas valora. En la internacia merkato unu flavventra kornofazano kostas pli ol 1 000 pundojn. La flavventra kornofazano estas malvigla kaj malrapidema, tial oni nomas ĝin

stulta fazano. Ĉar kornofazano estas timema kaj kaŝiĝema, la bredado estas malfacila kaj la naskokvanto malgranda. Nun tia fazano ricevis protektadon de la ŝtato.

Ĉeval-fazano estas mondfama. Du plumtufoj vidiĝas ambaŭflanke de ĝia kapo, longaj kaj iom malmolaj, elstarantaj super la kolo, kvazaŭ kornoj, tial oni facile prenas ilin por ĝiaj oretoj kaj ĝi portas alinomojn kornogalino kaj oreogalino. Komprenibile la plej rimarkinda estas ĝia vosto, kiu portas tiel longajn kaj disfalantajn plumojn, tute similajn al la ĉevala vosto, kaj pro tio ĝi ricevis la nomon.

La ĉeval-fazanoj dividiĝas en tri speciojn, tibetan, bluan kaj brunan, ĉiujn proprajn al Ĉinio. La plej rara estas la bruna, vivanta nur en la provincoj Hebej kaj Ŝanŝji. La nombro estas tro malgranda. La bruna ĉeval-fazano



Fazanoj kun blanka verto kaj longa vosto

Foto de
GAŬ SIŬ'E


estas denaske batalema kaj ofte luktas per beko, ĝis la rivalo mortas. En la antikveco ĉinaj imperiestroj ofte uzis la vostoplumojn de bruna ĉeval-fazano kiel kuraĝigilon por militistoj. Ekzemple, meritoplana komandoro ricevis ĉapon faritan el plumoj de bruna ĉeval-fazano. En la dinastio Ĉing oni faris ĉapon el bluaj vostoplumoj de bruna ĉeval-fazano por oficisto kun malpli alta rango kaj ĉapon el koloraj vostoplumoj de bruna ĉeval-fazano kaj pavaj plumoj por oficisto kun pli alta rango. Oni povis scii pri la rango kaj merito de oficisto laŭ la nombro de la truetoj sur la pavaj plumoj.

Fazanadoj ekzistas ankaŭ sur la ĉina insulo Taj'ŭan. La plej famaj estas lofuro (*Lophura swinhoii*) kaj sirmatiko (*Syrnaticus humiae*). Lofuro estas tre bela, kun blanka egreto, ruĝaj ŝultroj kaj brile blua svelta korpo. Ĝi estas kvietaj kaj deteniĝema. Ĝia irado estas tiel rapida, ke estas malfacile ĝin trovi kaj kapti. En 1866 oni portis lofurojn al zoologia ĝardeno en Eŭropo por ekspozicii. Vizitantoj ilin varme bonvenigis. Vira sirmatiko brilas preskaŭ tutkorpe per bluaj-nigraj plumoj. Blankaj makuloj vidiĝas


sur ĝiaj flugiloj. La longeco de ĝia vosto atingas 50 centimetrojn. Ankaŭ sur ĝia vosto vidiĝas laŭvice blankaj makuloj. Vere bela birdo. Membroj de la nacieco Gaŭŝan en la montregiono Ali en Taj'ŭan ŝatas ornamojn el vostoplumoj de sirmatiko. Por apreci kaj esplori, eksterlandaj zoologiaj ĝardenoj kaj ornitologoj aĉetas sirmatikon je alta kosto. Nuntempe la nombro de sirmatiko jam estas tre malgranda.

Krom la supre menciitaj tre valoraj fazanedoj, estas ankaŭ

verdvosta lofodoro (*Lophophorus lhuysii*), ruĝventra krisolofa (*Chrysolophus pictus*) kaj blankventra krisolofa (*Chrysolophus amherstiae*), ĉiuj raraj en Ĉinio. Jam antaŭ pli ol 3 000 jaroj la prapatroj de ĉinoj hejmigis galinojn kaj elbredis multe da bonaj specioj, kiuj eksportiĝis en diversajn landojn. Nun Ĉinio alprenas metodon de aktiva protektado kaj racia ĉasado de sovaĝaj fazanoj, disvolvas plenenergie bredadon kaj paŝtadon de ili kaj diligente esploras kaj elkulturas novajn bonajn speciojn.



Brunaj ĉeval-fazanoj



Ruĝventra krisolofa

Foto de GAŬ ŜIŬ'E

Privata infanvartejo

SU Gujŝu, la patrino de Tingting, diris al mi: "Post kiam Tingting ekvizitis la infanvartejon funkciigatan de avino Sun en ŝia hejmo, ŝi fariĝas tre sana. La infanvartejo estas pura kaj bone nutras kaj klerigas la infanojn. Krome ĝi estas proksima al mia domo."

La 32-jara patrino estas tornistino de la Pekina Unua Fabriko de Bastensiaj Elektroaparatoj. Antaŭ du jaroj, kiam ŝi finis siajn feriojn por akuŝado, ŝi klopodis por trovi bonan infanvartejon por sia solfilino, sed ne sukcesis.

La edzo de Su estas ŝoforo en aŭtokompanio. Ankaŭ en lia kompanio ne estas infanvartejo. Ŝia bopatrino ne povas helpi ilin

pro malbona sanstato. Ĝuste kiam ili ĉagreniĝis pro la nesolvebla problemo, ili informiĝis, ke Sun Ŝue ekfunkciigis privatan infanvartejon, kaj senprokraste konfidis Tingting al ĝi. De tiam Su Gujŝu ĉiutage iras al la laborejo akurate kaj en la pasintaj du jaroj neniam petis forpermeson pro la infano.

Nun en Pekino troviĝas 790 000 antaŭlernojaraj infanoj, el kiuj nur 40% sukcesis eniri en la ŝtate aŭ kolektive funkciigatajn infanvartejojn aŭ infanĝardenojn. Pro manko de domoj, monrimedoj kaj pedagogoj, tiaj fondaĵoj ne povas multe disvolviĝi. Tial la privataj infanvartejoj grandnombre aperintaj en Pekino

iagrade solvis la malfacilon en infanvartado de la urbo. Nun la tuta urbo jam havas pli ol 14 000 privatajn infanvartejojn funkciigatajn de unu aŭ pluraj familioj. Ili ĉefe akceptas proksimajn infanojn de malpli ol tri jaroj.

Post sia emeritiĝo 54-jara Sun Ŝue fondis la infanvartejon en junio 1982, responde al la alvoko de la loĝkvartala komitato. Antaŭ tio ŝi prezentis al ĝi peton pri fondo de infanvartejo. Ricevinte la permeson, ŝi kaj ŝiaj aliaj familianoj iris al hospitalo por ricevi korpan ekzamenon. Ĝi konfirmis ilian bonan sanon. Dume la loĝkvartala komitato sendis rigardi la higienan kaj loĝadan kondiĉojn de Sun. Konstatinte, ke la kondiĉoj konformas al la postuloj, la loĝkvartala komitato donis al ŝi ateston pri fondado. Ĝenerale por privata infanvartejo du vartistinoj rajtas akcepti sep infanojn.

"Estas plezuro por mi servi al la socio. Mi tre amas infanojn. Kun ili mi ĉiam estas ĝoja. Kaj cetere mi povas helpi per mia servo junajn patrinon solvi realajn malfacilojn." Tion dirinte Sun turnis sian paroltemon al infano en siaj brakoj. Ĝi nomiĝas Dongdong. Denaske malforta, la bebo ofte malsaniĝis pro nelerta zorgado hejme, kaj ĝiaj gepatroj devis ofte peti forpermeson por porti ĝin en hospitalon. Kiam

Avino Sun kaj infanoj



preskaŭ unujara Dongdong estis portita al la infanvartejo de Sun, ĝi aspektis malgrase kaj pale. Avino Sun preparis por ĝi nutrozajn kaj bongustajn manĝaĵojn, portis ĝin eksterdomen por sunumado kaj akurate siestigis ĝin. Pasis kvar monatoj. Dongdong ne nur ne malsaniĝis, sed eĉ dikiĝis. La patro de la infano plurfoje venis al Sun por esprimi sian koran dankon kaj helpis la infanvartejon per siaj servoj.

Avino Sun verŝis sur la infanojn sian profundan amon, por tio ŝi estas multe amata de la infanoj kaj respektata de iliaj gepatroj. Troviĝas iu 3-jara knabino, kiu havas eblecon viziti oficialan infanĝardenon, sed ŝi ne volas disiĝi kun avino Sun kaj nun ankoraŭ restas ĉe ŝi.

Ĝenerale la infanvartejo laboras de la sepa matene ĝis la sepa vespere. Jang Menghŭa, helpantino de Sun, diris: "Nia labortempo estas ŝanĝebla laŭ la postuloj de la gepatroj." Ankaŭ la edzo de Sun kaj ŝia filo tre amas infanojn kaj helpas ŝin post la labordeĵoro. En ŝia domo de tempo al tempo aŭdiĝas gaja ridado de infanoj kaj plenkreskuloj.

Sun Ŝue loĝas en ĉin-stila kvadrata korto kun du dormoĉambroj, unu kuirejo kaj malgranda manĝejo. Pro malvasteco de la domo, ŝi dufoje ĉiutage kondukas la infanojn eksteren. Tio ne nur utilas al la sano de la infanoj, sed ankaŭ ebligas al ili vidi la socion kaj disvolvas ilian sensecon.

"Ni ne nur faras ĉion por ke la infanoj bone manĝu, dormu kaj ludu ĉi tie, sed pli grave por ekspluati ilian inteligentecon." 40-jara Jang Menghŭa lernigas al la infanoj kalkuladon kaj kanton kaj rakontas al ili rakontojn. Avino Sun tre atentigas instruadon al la infanoj per figuroj. Kiam ŝi aĉetas vivajn fiŝojn, ŝi unue metas ilin en kuvon por ke la infanoj rigardu.

La infanvartejo mem respondecas pri profito kaj malprofito. Por la vartado ĉiu infano devas pagi monate 24 jŭanojn, el kiuj 14 jŭanoj estas subvencie pagitaj de la institucioj aŭ entreprenoj de la gepatroj. 10% de la totala enspezo estas uzataj por domludo, uzado de elektro kaj kranakvo, administrado kaj komuna akumulo. Sun Ŝue kaj Jang Menghŭa ĉiumonate enspezas 60-70

jŭanojn, egale al la salajro de ordinara laboristo. Por la beboj la kosto por maten-, tag- kaj vespermanĝo en la infanvartejo estas 7-9 jŭanoj monate.

La laboro de la infanvartejo de Sun Ŝue estas gvidata de la Erlonglu-strata Loĝkvartala Komitato de Pekino. La komitato invitis emeritan eksestron de infanĝardeno Ĝang Ĉijŝong direkti la 24 tiajn infanvartejojn de la loĝkvartalo kaj helpi ilin solvi malfacilojn. La virina federacio de la komitato faras dufoje kontrolon al ili ĉiujare. La infanvartejo de Sun estis elektita kiel avangarda infanvartejo en la pasintaj tri sinsekvaj jaroj.

Maŭ Jujan, esploristo de la Psikologia Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, opinias, ke la privataj infanvartejoj ne povas kompari sin kun la oficialaj en monrimedoj, domoj, ludiloj kaj higienaj kondiĉoj, tamen la maljunulinoj de tiuj vartejoj zorgas la infanojn kiel avinoj kaj facile starigas kvazaŭparencan rilaton kun ili. Krome la infanvartejoj tre similas al la hejmoj de infanoj, ili rapide alkiŝiĝas al la nova medio. Tial tiaj privataj infanvartejoj estas tre bonvenaj.

Dongdong kaj avino Sun



Necesas lavi la manojn antaŭ manĝado



Masaĝo hejme praktikebla

de A FANG

En la ĉiutaga vivo ofte okazas malsanoj, kiujn oni povas hejme kuraci per masaĝo praktikata helpe de familiano. Jene masaĝa terapio por kelkaj oftaj korpaj doloroj:

KAPDOLORO

Diversa estas la kaŭzo de kapdoloro. La jena masaĝo plej bone efikas sur kapdoloron kaŭzitan de malvarmumo, sunfrapo aŭ malsekeco:

1. Prempuŝi la akupunkturajn punkton *Jintang*, meze de la interbrovo (Vd. bildon 1) per la dikfingroj de ambaŭ manoj kaj de tie al la tempioj kaj poste forte froti la tempiojn kelkfoje. Tion ripeti 20-30 fojojn.

2. Froti la kaphaŭton per fingroj laŭ la rando de la kapharoj kelkdek fojojn.

3. Pinĉi la akupunkturajn punkton *Bajhuj*, meze de la veroto, pli ol 10 fojojn. (Vd. bildon 2)

4. Pinĉi la akupunkturajn punkton *Jongĉjŭan*, meze de la plandoj, pli ol 10 fojojn. (Vd. bildon 3)

5. Pinĉi la akupunkturajn punkton *Hegu* inter la dika kaj montra fingroj pli ol 10 fojojn. (Vd. bildon 4)

6. Frapi la kapon per beforme kunmetitaj fingroj kelkdek fojojn.

TORTIKOLO

Kaŭze de malkonvena alteco de kapkuseno aŭ malĝusta pozo de dormanto, precipe kiam oni estas laca kaj atakita de malvarmo ĉe la nuko en la dormo, oni ofte suferas de tortikolo, kontraŭ kiu aplikebla estas la jena masaĝa terapio:

1. Knedi la dolorajn ŝultron kaj nukon 20 fojojn.

2. Pinĉi la akupunkturajn punktojn *Fuliŭ*, *Ĉengŝan* kaj *Ĝjŭegu* 10 fojojn respektive. (Vd. bildojn 5, 8 kaj 6)

3. Froti la akupunkturajn punkton *Fengĉi* kelkdek fojojn. (Vd. bildon 2)

4. Pinĉi la akupunkturajn punkton *Ĝjanĝing* 5 fojojn. (Vd. bildon 7)


5. Knedi malforte la ŝultron kaj nukon por malstreĉi al la suferanto la muskolojn.

6. Teni la kapon de la suferanto permane, ĝin turni malrapide kaj, subite ĝin skui kun rapida movo kaj modera forto, kaj samtempe formovi la manojn, ĉe kio aŭdeblas krako de artikolo.


ŜULTRA KAJ DORSA DOLORO

Ŝultra kaj dorsa doloro ofte okazas al tiuj, kiuj longe laboras per la supraj membroj aŭ side laboras ĉe tabloj. En tia kazo utila estas la jena masaĝo:


1. Kuŝigi la suferanton surventre, knedi kaj froti permane la dorson de malsupre supren laŭ




1




2



3



4



ambaŭ flankoj de la spino 20-30 fojojn.

2. Premi la akupunkturajn punktojn Ŭejĝong kaj Ĉengŝan kaj pinĉi la akupunkturajn punkton Ŝenmaj pli ol 10 fojojn. (Vd. bildon 8)

3. Knedi kaj premi la dolorajn korpo-partojn 20-30 fojojn.

4. Pinĉi, tiri kaj knedi la akupunkturajn punkton Gjanĝing kelkdek fojojn. (Vd. bildon 7)

5. Frapeti la ŝultrojn kaj dorson per duon-pugnigitaj manoj.

LUMBA DOLORO

Kompleksa estas la kaŭzo de lumba doloro. La lumba doloro kaŭzita de troa streĉado, malvarmo-frapo aŭ troa ŝarĝo al lumbaj muskoloj estas kuracebla hejme per jena masaĝo:

1. Kuŝigi la suferanton surventre, knedi kaj froti la lumbon ĝisvarme.


2. Pinĉi la akupunkturajn punktojn Ĉengŝan, Ŭejĝong kaj Fuliŭ kelkdek fojojn respektive. (Vd. bildojn 8 kaj 5)

3. Froti kaj premi la doloran parton per fingroj aŭ tenaroj kun forto iom post iom grandigita.

4. Frapi la lumbon facile kaj takse per duon-pugnigitaj manoj.

La supre prezentitaj masaĝaj terapioj ne estas malfacilaj. La koncernajn akupunkturajn punktojn oni povas trovi laŭ la bildoj. Se la masaĝato sentas doloreton, formikadon kaj ŝveligon dum la masaĝo, tio montras, ke la celataj akupunkturaj punktoj estas trafitaj.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Lhasa
3. Ŝihezi
4. Karamaj
5. Kaŝi
6. Ŝĵian
7. Ĉingdaŭ
8. Ĉongĉing
9. Ĉengdu
10. Gansu-provinco
11. Ĉinghaj-provinco
12. Taj'ŭan-provinco
13. Ŝanhajo

DENG ŜJAŬPING PRI LA PERSPEKTIVO DE ĈINIO

Parolante pri la perspektivo de disvolviĝo de Ĉinio, Deng Ŝjaŭping, la estro de la Konsilio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, diris antaŭ ne-longe al fremdlandaj amikoj: "En la pasintaj 35 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, ni faris nemalmultajn bonojn por la popolo. Precipe en la lastaj 5 jaroj ni plifortigis demokration kaj regadon laŭ leĝoj kaj praktikis politikojn malfermi nian pordon al la mondo kaj vigligi enlandan ekonomion, kio havigis al Ĉinio rimarkindan ŝanĝon. Antaŭ 5 jaroj la jara mez-nombra enspezo de ĉiu ĉino estis nur 250 usonaj dolaroj, sed nun ĝi iom superis 300 usonajn dolarojn. La politikoj jam donis la fruktojn. Kompreneble la enspezo de 300 dolaroj estas de malalta nivelo, sed ni praktikas socialisman principon, ni per tio sukcesis solvi ĝenerale la problemon de manĝaĵoj, vestoj kaj vivbezonaĵoj de la popolo. Nia celo estas, ke la totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo kvarobliĝu kaj ĉiu ĉino enspezu jare 800-1000 usonajn dolarojn en la fino de la kuranta jarcento. Tiam Ĉinio liberigos sin de mizero, kaj multe pliboniĝos la popola vivo. Eĉ tiam Ĉinio estos disvolviĝanta lando, sed kun tiu bazo ĝi proksimiĝos al la nivelo de la disvolviĝintaj landoj post 30-50-jara klopodado.

1984 — RICRIKOLTA JARO DE ĈINIO

Oni taksas, laŭ statistiko en la pasinta oktobro, ke la totala produktokvanto de grenoj en 1984 atingos ĉ. 400 milionojn da tunoj, je 12.5 milionoj da tunoj pli multe ol tiu en 1983; la produktokvanto de kotono en 1984 estos ĉ. 5.5 milionoj da tunoj, je 20% pli multe



Staplado de nova greno


ol tiu de 1983. Reduktiĝis la produktokvanto de kolzosemo pro malmultiĝo de la kulturata areo, sed pliproduktiĝos ternukso kaj helianta semo. Oni taksas, ke la produktokvanto de oledonaj plantoj en 1984 plimultiĝos je pli ol 4% kompare kun tiu de 1983. Ankaŭ tiu de sukerdonaj plantoj, tabako, juto kaj aliaj industriaj plantoj

pligrandiĝos kompare kun tiu de 1983.

ĈINA INDUSTRIALIA PRODUKTADO EN PLENA LEVIĜO

La totala produktovaloro de la ĉina industrio en 1984 estis ĉ. 693 miliardoj da jŭanoj, je 12.5% pli multe ol tiu en 1983.

La Ĉinhŭangdaŭ-a Fabriko de Industri-teknika Vitro, Hebej-provinco, elfaris vitron, kiu povas izoli sonon kaj varmon kaj rezisti kontraŭ frosto. La foto montras, ke laboristinoj ekzamenas la kvaliton de tia vitro.



Laŭ statistiko en la fino de la pasinta septembro oni jam superplenumis la jaran produktan planon de 14-specaj industriaĵoj inkluzive de metaltranĉilo, mantraktoro, industria kaldrono, internbrula motoro kaj mikrokomputero. Almenaŭ 75% de la jara produkta plano de 73 specoj inkluzive de ŝtalo, kaŭstika sodo, glaco kaj aŭto estis plenumitaj. La produktokvanto de energio egalas al 560 milionoj da tunoj da norma karbo, je 8.6% pli multe ol tiu en la sama periodo de 1983, tiu de fridujoj, koloraj televidiloj, magnetofonoj, lavmaŝinoj kaj elektraj ventumiloj plimultiĝis je 45-150% ol tiu en la sama periodo de 1983, kaj oni kreis pli ol 4 000 novajn specojn de tekstilaĵoj, el kiuj 65% jam produktiĝis pogrande.

PLEJ GRANDA ORMINEJO DE ĈINIO EN KONSTRUADO

Sanŝandaŭ-orminejo, la plej granda en Ĉinio, ekkonstruiĝis lastatempe ĉe la bordo de Lajĝoŭ-golfo de Bohaj-mar-o.

Laŭ projekto ĝi produktos tage 1 500 tunojn da erco. La minejo havas riĉan rezervon kun erco altklasa, facile ekspluatebla, selektebla kaj fandebila.

NOVAĴAGENTEJO DE INFANOJ

La Novaĵagentejo de Ruĝa Kravato, la unua novaĵservo funkciigata de infanoj en Ĉinio, fondiĝis lastatempe en Ŝanhajo.

Ĝi celas riĉigi la postlecionan vivon de la junpioniroj de la urbo.

En la novaĵagentejo funkcias sekcioj de redaktado, informo kolektado kaj interrilatigo. Nun en la agentejo laboras 19 redaktoroj kaj raportistoj, el kiuj la plej aĝa estas 14-jara kaj la plej juna 11-jara. Ili estas elektitaj el miliono da junpioniroj.

La novaĵagentejo starigos sian filion en 22 distriktoj kaj gubernioj de la urbo. Ĝi, krom sendi in-

formojn al siaj filioj kaj la ĵurnalo "Informoj de Ruĝa Kravato", liveros ankaŭ kontribuadojn al geknabaj gazetoj aŭ ĵurnaloj de la tuta lando.

EKSPONEJO "MAŬLONG — MARKO POLO" EN PEKINO

En la pasinta novembro la plej granda metiartaĵa eksponejo de Ĉinio "Maŭlong — Marko Polo" malfermiĝis al ĉinaj kaj fremdlandaj gastoj en la orienta antaŭurbo de Pekino. Antaŭe ĝi estis vendejo de metiartaĵoj, ornamaĵoj kaj tapiŝoj, titolita per la nomo de fama itala vojaĝisto Marko Polo. Ĝi havas historion de pli ol 50 jaroj.

La ekspona halo kovras areon de 7 000 kvadrataj metroj. Ĝiaj dek mil elmontraĵoj inkluzivas eburajn skulptaĵojn, jadaĵojn, kloroneaĵojn, lakaĵojn, inkŝtonojn, kaligrafaĵojn, pentraĵojn, antikvaĵojn, imitaĵojn de antikvaĵoj, oraĵojn kaj arĝentaĵojn.

Krom akcepti vizitantojn la eksponejo okupiĝas ankaŭ pri pogranda kaj podetala vendado.

ĈINAJ VOLANISTOJ EN NEDERLANDA KONKURSO

La tri-taga Nederlanda Volana Turniro de Majstroj finiĝis en Utrecht, la 21-an de oktobro 1984. La ĉinaj volanistoj gajnis tri ĉampionecojn kaj du subĉampionecojn.

La ĉinaj volanistoj partoprenis en la finaloj de ĉiuj kvin disciplinoj. En la solludo ĉina volanisto Han Ĝjan venkis faman danlandan sportiston Morten Frost per 15:9 kaj 18:14.


En la virina solludo ĉina volanistino Han Ajping venkis Kirsten Larsen de Danlando per 11:7 kaj 11:1 kaj per tio gajnis la ĉampionecon.

Ĉinaj volanistinoj U Diŝji kaj Lin Jing venkis Nora Perry kaj Gillian Clark de Anglio kaj gajnis la ĉampionecon de virina duobla ludo.

"EKSPOZICIO DE SOVETUNIAJ MODERNAJ PENTRAĴOJ" EN ĈINIO

La ekspozicio havis sian lokon en Pekino kaj Ŝjian inter la lasta

La ekspozicio altiras ĉinajn rigardantojn.



tagdeko de oktobro kaj la meza tagdeko de novembro 1984. Ĝi elmontris pli ol 60 verkojn de 50 pentristoj, inter kiuj ne mankis gajnintoj de Premio de Lenin kaj meritoplenaj artistoj. La pentraĵoj, kun vastaj temoj kaj diversaj stiloj, prezentas la popolan vivon, ekonomian konstruadon, morojn kaj naturajn pejzaĝojn de Sovetunio. Ili helpas la ĉinajn rigardantojn koni la sovetunian popolon kaj la sovetunian modernan pentrarton.

BERLINA ĈAMBRA ORKESTRO "MUSIC COMRADE" EN ĈINIO

En la pasinta oktobro la Berlina Ĉambra Orkestro "Music Comrade" de la Germana Demokratia Respubliko faris prezentadon en Pekino kaj Ĉengdu. Ĝi ludis verkojn de Mozart, Telemann, Bach, Vivaldi, Handel kaj aliaj klasikaj kaj modernaj muzikistoj de Eŭropo. La artistoj estis varme laŭdatataj de la ĉinaj aŭskultantoj pro sia bela kaj strikta ludado kaj perfekta kunlaboro.



Prezentado de la Berlina Ĉambra Orkestro "Music Comrade" en Ĉinio

"FRANCA TELEVIDA SEMAJNO" EN PEKINO

La "Franca Televida Semajno" kune aranĝita de la ĉina Centra Televida Stacio kaj la Franca Ministerio por Eksteraj Rilatoj okazis en la Nacia Kultura Palaco en Pekino, oktobro 1984, laŭ la plano de la ĉina-franca kultura interŝanĝo de 1984-1985.

Dum la semajno estis montritaj


dek televidaj filmoj rakontaj, serioj kaj dokumentaj, kaj aliaj programoj pri arto, muziko, geknaboj, sportoj, novaĵoj kaj afiŝoj, kiuj daŭris sume pli ol 40 horojn. Oni prezentis ankaŭ novajn teknikojn de franca televido.

La "Ĉina Televida Semajno" jam okazis en la Kultura Centro de Pompidou en januaro de 1984 en Parizo, kiu estis bone akceptita de la francaj rigardantoj.

NOVA METODO DE FUNGOKULTURADO

Fungo estas ŝatata pro sia bongusteco. El ĝi oni faras famajn pladojn kaj bonan kuracilon. La nova fungokultura metodo "amasigo de plastaj sakoj", elpensita de Ĉin Ŝiŭben, agonomo de la Anjing-subprovinca Agrikultura Esplora Instituto, Henan-provinco, ricevis premion de scienc-esplora frukto de la provinco.

Ĉin Ŝiŭben (la unua de maldekstre) diskonigas sian novan kultur-metodon.




Fotoj de ŜIN HŬA

Fungoj kulturitaj per la nova metodo



Nova teknika revolucio kaj energia perspektivo de la mondo



Akvotirilo movata per vento, vaste uzata en la marborda provinco Fuĝjan

LA mondo nun alfrontas novan teknikan revolucion, kiu donos profundegan influon sur diversaj flankoj inkluzive de energifontoj.

DAŬRE KRESKOS ENERGIKONSUMO

En la teknika revolucio disvolviĝos novaj kaj regeneraj energioj. Kvankam energikonsumo por krei pounuan produktvaloron multe reduktiĝos pro efika ŝparo, dank' al apliko de novaj tekniko kaj materialoj, tamen tio ne signifas malpliigon de la totala energikonsumo de la homaro.

Mondaj energiaj fakuloj asertis, ke preskaŭ sensanĝa restos la tendenco de kreskanta energibezono, ĉar la landoj de la tria mondo bezonas praktiki disvolvajn planojn, kaj ĉiuj landoj, eĉ la plej evoluintaj, devas havi certan pliiĝan rapidecon en produktado. La proporcio de la tria mondo en la monda energikonsumo altiĝos je 33% fine de la kuranta jarcento. En la jaro 2030 la monda loĝantaro plimulduobliĝos dum la energikonsumo 3-4-obliĝos.

Tio inkluzivas ankaŭ iujn plej evoluintajn industriajn landojn.

Raporto de la Informa Buroo de la usona Energia Ministrejo montras, ke dum 1960-1982 tiu lando reduktis la energikonsumon je 20% por krei podolaran produktvaloron, sed en tiuj jaroj la totala konsumo de energio altiĝis je 61%.

NOVAJ ENERGIOJ

Surbaze de nova teknika revolucio, estonta energifonto ŝanĝiĝos de fosilia al nefosilia kaj de neregenera al regenera. Tio postulos tre longan tempon. Referaĵo, publikigita maje 1981, de la mondfama Internacia Instituto de Aplikata Sistema Analizo diris: "Laŭ la tutmonda vidpunkto, estas bezonata longega tempo por anstataŭigi iun energiteknikon per la alia kaj estas neimageble fini la ŝanĝon en malpli ol 50 jaroj." Tiu referaĵo naskiĝis post sepjara esplorado de 140 sciencistoj el 20 landoj, tial sendube aŭtoritata estas ĝia konkludo: energia anstataŭigo bezonas cent jarojn.

Kompreneble, en la venontaj kelkdek jaroj, dank' al la teknika revolucio kaj la sukcesa apliko de progrese sinteza teknologio, energiŝanĝo bezonos eble nur pli ol duonan jarcenton. Laŭ antaŭdiro de specialistoj, ĉirkaŭ la jaro


2050 komenciĝos nova epoko de utiligo de la tiel nomataj "eternaj energioj", t. e. nuklea fuzio kaj koncentra uzado de sunenergio. Do, de nun ĝis 2050 la mondo troviĝos en transira periodo en kiu estos uzataj multspecaj energioj.

Kiuj estas la novaj kaj regeneraj energioj? Aŭguste 1981 energia konferenco en UNO difinis, ke ili estas tiuj de la suno, tervarmo, vento, tajdo, ondo, maro, lignokarbo, vegetaĵo, oleskisto, olea sablo, torfo, lignohejtaĵo, bruta forto kaj akvo, entute 14 specoj. La lastaj tri fakte jam estas ne "novaj". Ĉar ili estas regeneraj, oni listigis ilin por atentigi la landojn, kiuj nun prenas ŝtonoleon kiel la ĉefan, utiligi ankaŭ alispecajn. Al nuklea la konferenco ne donis difinon, sed verŝajne ĝi devas aparteni al la nova.

PETROLA EPOKO ANKORAŬ NE PASIS

Antaŭ 2050, precipe antaŭ 2000, petrolo ludos rolon de ĉefa energio. Sed iom post iom falos ĝia proporcio en la konsisto de monda energikonsumo. Nun iuj industriaj landoj jam reviziis sian politikon, kiun ili elmetis antaŭ kelkaj jaroj por kiel eble plej malmulte uzi petrolon. Laŭ "Malproksima Perspektivo por Livero kaj Bezono de Petrolo" sankciita de la japana kabineto januare 1984, Japanio malrapidiĝos siajn paŝojn al la celo de nedependo de petrolo kaj malaltiĝos la petrolan proporcion en la landa energikonsumo ĝis 42% antaŭ la venonta jarcento. Tio montras ke eĉ tiam petrolo estos sendube la ĉefa energifonto de Japanio.

Dokumento de la 11-a monda ŝtonolea konferenco en 1983




Oni provas altproduktan natur-gasan puton en ĉina-usona kunlabora mara regiono ĉe Jinggehaj en la Suda Ĉina Maro.

montras, ke en la jaro 2000 la proporcioj de diversaj energioj por monda konsumo estos: ŝtonoleo 34%, karbo 30%, gaso 20% kaj aliaj 16%. Jen ankaŭ ŝtonoleo ĉe la unua loko.

En la komenca tempo de la 21-a jarcento ŝtonoleo ne perdos sian ĉefan lokon. Eble post la jaro 2020 la situacio komencos ŝanĝiĝi: la proporcio de karbo alte leviĝos, ĉar ĝi abundas en la

mondo. Kaj kun malkara kosto nuklea povo fariĝos ĉefa rimedo por produkti elektron. Aperos tendenco de energia konsumo al elektrigo. Tiam olesabla, oleskista kaj peza oleo, novaj kaj regeneraj energioj estos multe uzataj kaj petrolo malaperos paŝon post paŝo. Se ĝi ankoraŭ ne tute elĉerpiĝos, ĝi eble uziĝos kiel kemiindustria materialo por altigisian ekonomian valoron.

Ministoj en ŝakto en la karbobazo Ĝangjŭan, Sanŝji-provinco



KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupo por 5 vortoj aŭ mallongigoj. **Por fotoj:** 1 interna. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. **Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili. Bonvolu sendi la intern. resp. kup. nepre rekte al EPĈ-redakcio, P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio.**

- * Esperanta grupo de Eksploatkompanio de Si-an Vesper-jurnalejo dez. kor. kun tutmondaj s-anoj pri komerco kaj ekonomiko. Adreso: N-ro 9 Si-fu strato, Si-an, Ĉinio.
- * Ni serĉas gekorespondantojn por niaj gekursanoj en baza nivelo (ekde 18-j.). Estas bonvenaj leteroj tutmondaj pri ĉiuj temoj. Aparte ni volas interŝanĝi p.m. kaj b.k. Respondo garantiata. Adreso: Tonglu-a Esperanto-Ligo, Zhejiang-provinco, Ĉinio.
- * Marlena Lewandowska (29j. muzikistino), ktm., pĉt. ul. Kujawska 15/37 84-230 Rumia, Pollando.
- * S-ro Teruo Nakasuĝi, (pensiulo) Itu, Mituĉo, Ibogun, Hyogoken, 671-13, Japanio. Dez. kor. kaj interŝ. tutmonde: fotoj, bildkarto, pentraĵoj el geknaboj.
- * Hans Dito Goeres (49j.), Viersenerstr. 123, BRD-4050 Moendrengradbach-1, FRG. Dez. kor. kun ĉinoj pri la postulo de paralelkolumnoj en Esp. ĉe ĉiuj tekstoj, Germanaj, Anglaj, Francaj pri tekniko moderna kaj pri instaloj, konstruataj el eksterlando en Ĉinio, por vaste larĝigi la konatiĝon kun tiu tekniko en Ĉinio. Mi estas preta kunlabori en tiu ĉi tasko, je modesta rekompenco.
- * Vlado Stanek, Str. V.P. Toth 16/2, 036 01 Martin, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. tutmonde.
- * 24-j. polino deziras korespondi pri literaturo, teatro, kuirado kaj interŝanĝi bildkartojn, diapozitivojn kaj esp-librojn. S-ano Danuta Adamczuk, 51-141 Wroclaw, Brzechwy. 83. Pollando.
- * Grupo de studentinoj de Pedagogia Altlernejo dez. kontaktiĝi kun grupo aŭ individuaj gesamideanoj en la tuta mondo kaj kor. pri ĉiuj temoj. Bonv. skribi al: Studenckie Koto Naukowe Esperantystow, pny Wyzszej Szkole Pedagogicruej, ul. Stowackiego 114/118, PL-97.300 Piotrow Trgbunalski, Pollando.
- * Lernanto (14j.), kol. pm., bk. kaj dez. kor. tutmonde. Hagen Schnauss, DDR-2723 Warin, PF: 9.
- * 19-j. studentino pri filologio dez. kor. tm. pri literaturo, muziko ktp. Claudia Daniela Balla, BD Stefan Plavat n-ro 2/1, Sc. B Apt. 2, 1900 Timisoara, Rumanio.
- * 54-j. instruisto Masao Yoshimoto, 614, 17 Miyakura, Otokoyama, Yawata-city, Kyoto-fu, Japanio, dez. kor. kun kolego.
- * 39-j. instruisto serĉas geamikojn por korespondado kaj interŝanĝo de bk. Jaromir Polak, 67161 Prosime Rice 149, Ĉeĥoslovakio.
- * 35-j. instruisto dez. kor. kun geesp-istoj en Azio, Afriko kaj Ameriko pri naturscienco, historio, ĉiutaga vivo, plenalorkuirado ktp. aŭ interŝ. bk. S-ro Walter Klag, Rudolfnergasse 8/11, A-1190 Wien, Aŭstrio.
- * Por esp-ista ekspozicio bonvolu sendi bk. al Lernejo BG 15, c/o Klag, Diefenbachgasse 15, A-1150 Wien, Aŭstrio. Mi respondos al ĉiuj!
- * 27j. Urszula Rzewiczok, ul. Debowa 56, 40-108 Katowice, Pollando vol. kor. kun ĉinaj esp-istoj.
- * 20j. Beata Gurszczynska, ul. Wl. Lokietka 41/6, 88-100 Inowroclaw, Pollando, vol. kor. kun ĉinaj esp-istoj kaj tutmonde pri diversaj temoj.
- * Jus-fondita esp.-asocio okazigas sian unuan esp.-kurson, kiun ĉeestas ĉ. 30 gelernantoj. Ni bezonas ĉiaspecajn esperantaĵojn, precipe facilajn legaĵojn, portugallingvajn aŭ internaciajn daŭrignivelajn lernomaterialojn, ktp. Ankaŭ korespond-proponoj estas bonvenaj. Niajn helpantojn ni dankos per bildkarto k. personaj leteroj. Adreso: Rondonopolis Esperanto-Asocio, Cx. Postal 97, 78500-Rondonopolis-MT, Brazilo.
- * 17j. Csibi Ildiko, Str. Mezeiek nr. 3, Loc. Ditraŭ 4214, Jud. Harghita, Rumanio, dez. kor. tutmonde pri muziko, naturo kaj turismo.
- * 17j. knabo Janusz Janoszka, ul. Reymonto 8, 42-653 Piekary, Slaskie 7, Pollando, vol. kor. kun geĵapanoj kaj geĉinoj pri piedpilko, budaismo, sporto kaj kulturo.
- * 29j. f-ino Eva Technikova, Smetanova 468, 468 41 Tanvald 2 Ĉeĥoslovakio, sopiras korespondi kun ĉinaj geamikoj.
- * 33j. Peter Radig, 8028 Dresden, Clara-Zetkin-Platz 21, DDR, dez. kor. tre volonte kun ĉinaj geamikoj.
- * Jeger Robert (15j. lernanto), Str. Penes Curcan, 28, Bl. Q30 ap. 1, Jud. Bihor 3700 Oradea, Rumanio, dez. kor. kun hungaro tm. pri diversaj temoj.
- * 13j. knabino Stephanie Poree, Maison du Rocher, 67 Bd Kennedy-35400 Saint Malo Francio, dez. kor. kun samaĝa knab(in)o.


FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Floroj
de **F. G. MARTIN** (Hispanio)



Mezepoka kastelo en la urbo L'Aquila
de **P. CERRETINI** (Italio)





8157N

劉松石
畫